

HORIZONTO



*KULTURA KAJ INFORMA REVUO
DE LA NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO*

10-a Jaro N-ro 55 (1)
Januaro-Februaro 1985



KORAN DANKON KAJ EK EN LA 1985-AN!

FONDAĴO IVO LAPENNA

LA "URUGVAJAJ MENUOJ" EN LA DOSIERO BLINKENBERG

KONTRAKTO INTER UEA KAJ LA SOVETIISMA MEM

HORIZONTO

KULTURA KAJ INFORMA REVUO
DE LA
NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO



Dumonata oficiala organo de la INTERNACIA
CENTRO de la NEŬTRALA ESPERANTO-
MOVADO (ICNEM).

Eldonata kaj presata de
ELDONEJO PERSPEKTIVO.

Redakta Komitato: Salvador Gumà, Ivo
Lapenna, Jean Thierry.

Adreso de la redakcio kaj administracio:
ELDONEJO PERSPEKTIVO, Nørregårds-
vej 91, DK-2610 Rødovre, Danio, kiu
prizorgas la distribuon de la artikoloj
kaj aliaj tekstoj al la respondecaj mem-
broj de la Redakta Komitato. La redak-
cio rezervas la rajton mallongigi la
tekstojn kaj korekti la lingvon konforme
al la Fundamento de Esperanto.

Abonojn akceptas la perantoj de HORIZONTO
aŭ rekte la ELDONEJO PERSPEKTIVO,
Nørregårdsvej 91, DK-2610 Rødovre, Danio.
Postĉekkonto: Kopenhago 9 32 95 95.

Jara abono por ĉiuj landoj: 100 danaj kronoj
aŭ ronda egalvaloro. Tiu abono ne inkluzivas
membrecon de ICNEM. Vidu la antaŭlastan
kovrilpaĝon.

Por recenzo bonvolu sendi 2 ekzemplerojn, por
mencio 1 ekzempleron de libro aŭ broŝuro.
HORIZONTO akceptas ankaŭ anoncojn.

ENHAVO

Koran Dankon Kaj Ek En 1985-an! (Ivo Lapenna)	1
Esploro kaj Dokumentado (ED) (Prof. D-ro Ivo Lapenna)	3
Fondaĵo Ivo Lapenna	7
11-a I.K. en Metz	8
Prudento por Esperanto (Vermaas/Munniksma)	11
Beletro (B. Aunis)	14
Oni Jam Diris Anticipe (D-ro I. Nagy) ..	16
Lingva Angulo	18
La Protekto De Rajtoj De Malliberigitoj (Prof. D-ro S. Anagnostakis)	19
El niaj Organizaĵoj	20
Internacia Informistemo Kaj Homaj Rajtoj (Stefan Maul)	21
Libroj Sub La Lupeo (S. Gumà)	22
Amnestio Internacia: Ĉampiono De Humaneco (F. Munniksma)	23
Leteroj	25
Nekrologo pri Ila Pancer	26
Mallonge	26
Persone (Pierre Gaborit 60-jara)	27

Frontpaĝa bildo: Dum la belega festvespero en
Kopenhago la 15-an de decembro 1984 omaĝe
al la 125-jara datreveno de D-ro L.L. Zamen-
hof, al la 30-jara datreveno de la fama Rezo-
lucio de Unesko en Montevideo, 1954, kaj al
la 75-jara datreveno de Prof. D-ro Ivo Lapenna.
Prof. D-ro Paul Neergaard transdonas al Ivo
Lapenna la Deklaron, la festvolumon, medalon
el Pollando, sonbendon kaj librojn el Ĉeĥoslo-
vakio. Ankaŭ la "Fondaĵo Ivo Lapenna" P.N.
komunikas tie ĉi al Prof. Lapenna. (V. p. 7 k. 10).

PERANTOJ

Aŭstrio:

D-ro Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020
Graz. Pĉk. Graz 1257.845. Jarabono: 230 ŝil.

Britio:

Geoffrey King, 228, Capworth Street,
London, Elo 7HL. Pĉk. 37.507.9106.
Jarabono: 7 anglaj pundoj.

Danio:

Eldonejo Perspektivo, Nørregårdsvej 91,
DK-2610 Rødovre. Pĉk. 9 32 95 95
Jarabono: 100 d.kr.

Francio:

Marie Thierry, 5 rue Léon Cogniet, F-75017
Paris, Pĉk. 191707 Z Rennes
Jarabono: 100 f.fr.

FR Germanio:

Rudolf Helmke, Wiesenstrasse 9, D-4773
Möhnesee-Günne. Konto Nr. 31 377 450
Sparkasse Möhnesee (BLZ 414 514 85)
Jarabono: 30 DM.

Grekio:

Adda Sakellaroupoulou, Aghias Paraskevis
30, Ateno 816. Jarabono: 100 d.kr.

Hispanio:

Luis Hernández-Yzal, Banca Mas Sarda:
1900 669/2, Vilafranca del Penedès
(Barcelono), Avenida de Barcelono 35.
Jarabono: 1300 pesetoj.

Israelo:

Ben-Alter Jehiel, P.O.B. 379, Petah Tikva.
Pĉk. Bank Hadoar 4-45854-8.
Jarabono: 100 d.kr.

Jugoslavio:

Prof. D-ro Oton Pancer, Dom Lavoslava
Svarco, Bukovacka cesta 55, Yu-41000
Zagreb. Tekuĉi raĉun: Zagrebačka banka
30101-620-16-012106. Jarabono: 100 d.kr.

Luksemburgo:

Albert Wickler, 1 rue de Kehlen, L-Olm.
Pĉk. 54175-49. Jarabono: 100 d.kr.

Nederlando:

Marianne Vermaas, Nieuwe Binnenweg 70,
I.R. 3015 BC Rotterdam. Pĉk. 333790.
Jarabono: 36 n.gld.

El ĉiuj aliaj landoj oni pagu al la
Administracio aŭ al unu el tiuj perantoj, ĝis
peranto en tiu lando estos trovita.

GRAVA RIMARKO: Oni akceptas abonojn nur
por la tuta kalendara jaro.

KORAN DANKON

KAJ EK EN 1985-AN!



Okaze de mia naskiĝtago la 5-an de novembro pasinta kaj de diversaj datrevenoj ligitaj al mia nomo, mi ricevis tian amason da esprimoj de simpatio kaj bondeziroj el ĉiuj mondopartoj, ke bedaŭrinde estas por mi maleble danki al ĉiu unuope. Fidante je la komprenemo de la gratulintoj, mi prenas la liberecon utiligi tiucele nian organon.

Antaŭ ĉio mi tutkore dankas al kolegoj Profesoroj D-roj Paul Neergaard kaj Juan Régulo Pérez, la iniciatintoj de la Deklaro omaĝe al miaj 55-jara laboro kaj atingoj por Esperanto. Same koran dankon al la centoj da subskribintoj de la Deklaro, al la redaktoro de MONATO, kie mi unue, ne sen agrabla surprizo, legis ĝin, kaj al la redakcioj de aliaj periodaĵoj kaj Esperanto-fakoj de radio-stacioj, kiuj komplete, parte aŭ resume publikigis ĝin, kiel ankaŭ al pliaj revuoj, kiuj presigis redakciajn artikolojn aŭ noticojn pri la datrevenoj aŭ pri mi persone. Fine, sed ne laste, mi dankas al ĉiuj sendintoj de donacoj kaj memoraĵoj, gratulaj kaj bondeziraj telegramoj, bildkarto, leteroj, ofte kun multaj subskriboj, kaj al geamikoj eĉ el tre foraj landoj, kiuj telefonis por saluti persone.

Tute apartan dankon mi esprimas al amiko Paul Neergaard, kiu, kun la helpo de la Kopenhaga *Horizonto*-Grupo, laŭ sia deziro redaktis n-ro 6/84 de *Horizonto*, kaj al ĉiuj kontribuintoj al tiu jubilea numero de la revuo. La elstare dignan kaj kulturan Festvesperon en la Palaco de Grafo Moltke en Kopenhago la 15-an de decembro, organizitan perfekte de Paul Neergaard kaj de la Kopenhaga *Horizonto*-Grupo, memore al la 125-jara datreveno de la naskiĝo de Zamenhof, al la 30-jara datreveno de la Rezolucio de Unesko favore al Esperanto, kaj omaĝe al mi persone, mi rigardas ne sole kiel tro altan personan honorigon, sed ankaŭ kiel omaĝon al ĉiuj esperantistoj, kiuj, inspiritaj de la humanecaj konceptoj de Zamenhof, diversmaniere kontribuis al la venko de Esperanto el lingva vidpunkto. Objektive, la Festvespero prezentigas ankaŭ kiel nia komuna plia paŝo antaŭen survoje al la Jubilea Jaro. Ĝi devus servi kiel modelo por organizado de prestiĝaj, solenaj publikaj kunvenoj sur loka nivelo ĉie en la mondo por memorigi la 100-jaran datrevenon de la Internacia Lingvo en 1987. En tiu senco la organizintoj meritas aplaŭdon de la tuta Esperanto-Movado.

Apenaŭ necesas diri, ke la justeco de la enhavo kaj la nobla intenco de la Deklaro profunde impresis min kaj intelekto kaj emocie. Mia feliĉo estis kaj restos por ĉiam duobla: pro mi persone kaj - el mia vidpunkto konsiderinde pli - pro Esperanto, ĉar mi rigardas la Deklaron ankaŭ kiel omaĝon al ĉio honesta kaj pozitiva en la Esperanto-Movado ekde Zamenhof ĝis niaj tagoj. Ĝi energie forpuŝas la kalumnian kaj ofendan malpuradon, kiun la konataj "kelkaj" ĵetas jam tre multajn jarojn sur min, sed samtempe ĝi ankaŭ forviŝas grandan nigran makulon desur la vorto "Esperanto", bedaŭrinde tro ofte makulata de samkarakteraj individuoj ankaŭ en la pasinteco, dum la tuta historio de Esperanto. Kaj tio por mi - certe ankaŭ por ĉiuj subskribintoj kaj gratulintoj - estas multe pli grava, ol la persona omaĝo, kiom ajn kara kaj ĝojiga.

Ne eblas ne diri kelkajn pliajn vortojn pri la pozitivaj aspektoj de tiu unika elpaŝo. Inter la subskribintoj de la Deklaro kaj gratulintoj troviĝas ne sole Akademianoj, inkluzive membrojn de la nuna kaj antaŭa Estraroj de la Akademio de Esperanto, kaj aliaj eminentaj, bone konataj geesperantistoj, pluraj el ili famaj ekster la Esperanto-Movado, sed ankaŭ kleraj kaj sindonaj ordinaj geesperantistoj, sen kies laboroj kaj oferoj Esperanto, same tiel, "neniam estus atinginta la nunajn maturecon kaj disvastigitecon". Krome, speciale kuraĝige por niaj komunaj bazaj idealoj kaj tial feliĉige por mi persone, apud la nomoj de membroj de la Honora Patrona Komitato de UEA kaj de funkciuloj de tiu Asocio, tie troviĝas ankaŭ la nomoj de la antaŭa kaj nuna redaktoroj de *Sennaciulo* kaj de aliaj SAT-anoj, kiel ankaŭ konataj aŭ malpli konataj aktivuloj el orienteŭropaj landoj, kelkaj eĉ el Soveta Unio. Kun la plimulto el la subskribintoj mi intime kunlaboris aŭ plu kunlaboras dum sinsekvaj periodoj de miaj aktivadoj por Esperanto ekde 1929 ĝis nun. Vere, pli reprezentan kernon de ĉio pozitiva en la Esperanto-Movado oni apenaŭ povas imagi.

Kiam, leginte la Deklaron en MONATO, mi tuj telefonis al Paul Neergaard por danki, lia unua reago estis: "Ni nur remetis la aferojn en la ĝustan lumon". Precize tian sencon donu al la omaĝo la tuta sincera esperantistaro: se la aferoj ne estus tiel krude ellumigitaj, la subskribintoj tute ne estus sentintaj la bezonon remeti ilin en la ĝustan lumon.

En la Deklaro la subskribintoj apogas "la iniciaton digne celebri la 100-jaran datrevenon de Esperanto en 1987 per komunaj fortoj de ĉiuj Esperanto-organizaĵoj kaj esperantistoj". Tiurilate, kiel denove emfazite en la Rezolucio de la 10-a Internacia Konferenco de N.E.M., niaj manoj restas etenditaj. Pro la kaŭzoj, kiujn *Horizonto* jam plurfoje detale eksplikis, ni tion faras, ĉar ekde nia iniciato en 1981 ni estis kaj plu estas konvinkitaj, ke tiu kultura evento povas esti adekvate celebrata kaj samtempe efike utiligata por decide progresigi la Internacian Lingvon sole per komunaj, bone planitaj kaj taŭge kunordigitaj ĉiudirektaj agadoj. Tamen, se la alia flanko, malatentante la interesojn de Esperanto, rifuzas kunlaboradon kaj nepre deziras iri sian propran vojon, ankaŭ ni devas iri la nian por doni, laŭ niaj eblecoj, maksimumon da kultura enhavo al la memorigo de la 100-jara datreveno.

Evidente, ni solaj ne povos realigi ĉiujn erojn de la Agadprogramo, kiun ICNEM ellaboris kaj prezentis kiel amendeblan bazon por komunaj agadoj, sed kiun, bedaŭrinde, la reprezentantoj de UEA ne volis eĉ pridiskuti (detaloj en *Horizonto* n-ro 3/84). Sed ni povas kaj jam komencis realigadi tiujn partojn de la proponita Agadprogramo, por kies plenumado ni disponas pri sufiĉe da homaj fortoj, intelektaj kompetentecoj kaj financaj rimedoj. Niaj celtrafaj jubileaj presaĵoj, jam vaste utiligataj, la programoj de niaj konferencoj, la partopreno en sciencaj kaj aliaj gravaj internaciaj kulturaj renkontiĝoj, artikoloj kaj intervjuoj jam publikigitaj aŭ disaŭditaj, prelegoj de niaj membroj en lernejoj kaj kulturaj societoj, ĝisdatigado de kelkaj dokumentoj de la iama Centro de Esploro kaj Dokumentado (CED) estas la komenciĝoj de la vojo, laŭ kiu ni iras renkonte al 1987.

Sur tiu vojo ICNEM kaj *Horizonto* bezonas la helpon ne nur de ĉiuj membroj, abonantoj kaj legantoj, sed de ĉiuj bonintencaj geesperantistoj. Nia voĉo jam forte eĥas en la Esperanto-Movado. En la ĵus pasinta jaro pli forte, ol iam antaŭe. Ĉiu povas helpi, por ke ĝi eĥu eĉ pli forte en 1985. Vi persone, vi leganto de tiuj ĉi linioj, povas facile tion fari per tuja renovigo de via kotizo aŭ abono, per membriĝo al ICNEM, se vi ankoraŭ ne estas membro, per havigo de multaj pliaj abonantoj, aliĝo al nia Konferenco en Metz, daŭra utiligado de niaj jubileaj presaĵoj, diskonigado de niaj komunaj ideoj kaj laboroj, kaj aliaj agadoj laŭ la principoj de humaneca internaciismo kaj aktiva neŭtraleco.

Kun la espero, eĉ konvinko, ke ĉiu helpos laŭ siaj eblecoj, mi tutkore deziras al ĉiuj feliĉan kaj prosperan Novan Jaron. Ĝi estu pli fruktodona ankaŭ por la Internacia Lingvo. Kun optimismo ek en la 1985-an!

Ivo Lapenna

ESPLORO KAJ DOKUMENTADO (ED)

Redaktas Prof. D-ro IVO LAPENNA

77 Grasmere Avenue, Wembley, HA9 8TF, Middlesex, Britio.

N-ro 47

82. ESPERANTO EN MONTEVIDEO (1954) LAŬ LA PAPERJOJ DE PROF. BLINKENBERG

82.1 Pri Kio Temas?

Prof. Andreas Blinkenberg estis unu el la membroj de la Delegacio de Danio dum la Oka Sesio de la Ĝenerala Konferenco de Unesko, okazinta en Montevideo en 1954. Estas vaste konate, ke tiu Sesio de la Ĝenerala Konferenco akceptis la jam faman Rezolucion de la 10-a de decembro 1954 favore al Esperanto. Nuntempe estas malpli konata la fakto, ke en la kunsido de la Programkomisiono de la 4-a de decembro 1954 Prof. Blinkenberg lanĉis preskaŭ nekredeble nekulturan atakon kontraŭ Esperanton, kaj ke en atmosfero de hontinda neseriozeco, kaŭzita de lia interveno, li sukcesis atingi, ke la apoga rezolucipropono de la Delegacio de Meksikio estis rifuzita per 23 voĉoj kontraŭ 3 favoraj (Meksikio, Urugvajo kaj Ĉinio) kaj 19 sindetenoj. Pri la seŝtagaj streĉaj eventoj, kiuj rezultigis la akcepton de la Rezolucio de 10.12.1954 favore al Esperanto, aperis detala raporto kaj dokumentoj en *Esperanto* de februaro 1955, en *Horizonto* n-roj 6/76, 1/77 kaj 2/77, kiel ankaŭ en ĉap. 22.3.4 de *Esperanto en Perspektivo* (p-oj 767-773), kaj aliloke. Ĉiu interesiĝanto pri tiu tuta afero, decide grava en la historio de Esperanto, devus legi aŭ relegi tion, aŭ almenaŭ la menciitan sekcion en *EeP*. Ĉi tie necesas diri kelkajn vortojn nur pri la "urugvajaj menuoj" en la nekultura atako de Prof. Blinkenberg en la Programkomisiono. En la komuniko al la gazetaro, kiun mi diktis al la sekretario de Urugvaja Esperanto-Societo Prof. Victor Luis Cao, bedaŭrinde forpasinta intertempe, kaj kiu poste aperis en la tuta urugvaja gazetaro, estis interalie dirite:

"En la menciita Komisiono la reprezentanto de Danlando, evidente ne sciante kion ajn pri la temo - kvankam li diris, ke li estas lingvisto - parolis neserioze kaj senfundamente kun la celo provoki ridojn. Li, ekzemple ne hezitis diri, ke Esperanto eble taŭgas por verki urugvajajn menuojn, sed ne por la literaturo, kvankam je 100 paŝoj de Palacio Legislativo (la parlamentejo, en kiu okazis la Konferenco, nuna rim.) troviĝas Ekspozicio de elstaraj verkoj de la tuta monda literaturo; kvankam en tiu sama Ekspozicio (temas pri la Unua Elmonro de la Universala Ekspozicio de Esperanto, nuna rim.) estas troveblaj verkoj originale skribitaj en Esperanto, ankaŭ de konataj lingvistoj..... Per sia kontraŭscienca kaj nekultura sinteno - kiu, krome, estas tre malbela ekzemplo de edukaj metodoj - li ofendis ne nur la 15.500.000 subskribintojn de la Peticio, ne nur la lingvistojn, kiuj parolas Esperanton, sed ankaŭ la landon, kiu gastigas la Konferencon".

La "urugvajaj menuoj" (manĝaĵoj), fakte tre bongustaj laŭ mia memoro, evidente ne plaĉis al Prof. Blinkenberg kaj tial li rigardis ilin tiel "primitivaj", ke Esperanto eble taŭgus nur por esprimi tiajn "primitivaĵojn", sed certe ne por la sublimaj sentoj de amo aŭ por literaturaj verkoj. Tio estis la senco de la "urugvajaj menuoj" en lia interveno kaj tio, en kunteksto de la tuta kontraŭkultura atako, kaŭzis veran kulturan skandalon en Urugvajo kaj sekve ankaŭ en la medioj de Unesko.

82.2 La "Urugvajaj Menuoj" en la Dosiero Blinkenberg

Post la forpaso de Prof. Blinkenberg antaŭ kelkaj jaroj, liaj paperoj (notoj, korespondataĵoj, manuskriptoj) estis transdonitaj al la Ŝtata kaj Universitata Biblioteko en Arhus (Danio). La afero pri Esperanto en Montevideo formas apartan, tre grandan dosieron. Nia abonanto S-ro Jens Stengaard Larsen, laŭ profesio bibliotekisto, havis la paciencon fotokopii la tutan dosieron, tajpi la preskaŭ nelegeblajn manskribitajn franclingvajn tekstojn kaj traduki la danajn. Ĉion ĉi li afable sendis al mi, pro kio mi ankaŭ publike dankas al li.

El tiu abunda dokumenta materialo, kiun, fakte, oni devus komplete publikigi, vidiĝas, ke ne temis pri ia subita, nepreparita atako, sed pri bone planita agado por malsukcesigi la Peticion, kiel mi suspektis jam en la tempo de Montevideo. Tie troviĝas, ekzemple, lia unua skizo pri parolado farota en la Programkomisiono, tri pliaj skizoj, pluraj editoritaj versioj de la parolado. El korespondado pri la afero en la dana, angla, franca, hispana kaj germana vidiĝas la partopreno de aliaj personoj, precipe de Prof. J. Nielsen, plia granda malamiko de Esperanto en la Delegacio de Danio. La dokumentoj evidentigas ankaŭ la eĥon, tre malagrablan por Prof. Blinkenberg, kaŭzitan de lia parolado. Tion montras ankaŭ lia dupaĝa skizo por defendo, kiu tamen restis nur skizo kaj neniam aperis. Ĉi tie estu citita nur la parto pri la urugvajaj menuoj, kiun, laŭ la paperoj, li eldiris en la kadro de sia atako de la 4-a de decembro en la Programkomisiono. En fidela Esperanto-traduko el la franca ĝi tekstas:

"Kaj tio estas esenca por ni: Esperanto ne estas, kaj ne povas esti, vera instrumento de kulturo (substrekitaj en la originalo, nia rim.) ĝuste pro sia artefarita karaktero. Ĉi sendube povas servi por peti hotelĉambron en la 5 aŭ 6 mondopartoj, sed se temus pri kunmeto de bona urugvaja menuo - kaj tie ni jam troviĝas sur la tereno de kulturo - Esperanto jam estus senpova (nia substreko). Kaj kiam oni parolas al ni pri tradukoj de Dante, de Shakespeare, de Racine, de Cervantes, de Goethe, de Dostojevski en Esperanto, oni sentas sin fantazii: la dieca muziko de tiuj grandaj genioj tradukita en lingvo malbone sonanta - kaj precipe sen rezonoj profundaj -, lingvo, kiu neniam estis tiu de patrino aŭ de amanto (almenaŭ mi tion esperas), tio ne estas serioza. Sed tio estas tre grava: ĉar tio estas la neado mem de kulturo".

Kiel oni vidas, en la supra versio de la parolado, editorita de Prof. Blinkenberg, la urugvajaj menuoj aperas en tute alia lumo, ol en la teksto, kiun mi diktis al Prof. Cao en la nokto tuj post la atako en la Programkomisiono, do kun freŝa rememoro pri ĉio okazinta tie, kaj en ĉeesto de Prof. Fernandez-Menéndez, D-ro Pfefer kaj aliaj montevideaj geamikoj, kiuj ĉeestis tiun hontindan kunsidon de la Programkomisiono. Kiu versio, do, estas ĝusta?

82.3 Komentoj

La prezento de la interveno de Blinkenberg en la komuniko de la Urugvaja Esperanto-Societo, kiun mi diktis al Prof. Cao, estas absolute ĝusta. Leginte nun lian editoritan version, mi fakte eĉ iom miris kiel mi povis tiel fidele resumi lian paroladon. Pri ĝi, inkluzive la urugvajajn menuojn, aperis artikoloj en la urugvaja gazetaro tuj la sekvintan matenon kaj abunde en la postaj tagoj. Ankaŭ la Montevidea Radio raportis kaj intervjuis min pri la afero. Okazis kultura skandalo, kiu ŝokis la publikan opinion de Urugvajo. Se tiuj informoj, ege embarasaj por Prof. Blinkenberg, ne estus ĝustaj, do li mem, aŭ la Ambasadado de Danio en Montevideo, aŭ la urugvaja Ministro de Edukado (samtempe prezidanto de la Konferenco) estus dementinta tiun eron, sed neniam demento okazis. Same tiel Prof. Blinkenberg ne povis dementi la faktojn, kiujn mi kiel observanto de UEA prezentis en mia protesta letero de la 8-a de decembro 1954 al la Prezidanto de la Konferenco kun kopioj al la Ĝenerala Direktoro kaj la

Prezidanto de la Ekzekutiva Komitato, distribuita tuj poste de la Sekretariato en la tiamaj laboraj lingvoj de Unesko al ĉiuj delegacioj. Pretere dirite, en tiu letero Prof. Blinkenberg ricevis bonan lecionon ankaŭ pro sia impertinenta diro, ke Esperanto ne taŭgas por literaturaj celoj, nek povas servi por esprimi amon. (La interesigantoj v. tiun leteron en *Esperanto* n-ro 2/1955, p-oj 57-59).

La malsameco inter la fakte eldirita parto rilate la urugvajajn menuojn kaj la teksto en la dosiero estas facile eksplikebla:

(i) Povas esti, ke la nuna teksto estis skribe preparita kiel gvidlinio por la parolado. Ĉar Blinkenberg libere parolis (ne legis), kiel estas kutimo en debatoj, li en sia malŝato de la urugvajaj manĝaĵoj kaj preskaŭ patologia malamo al Esperanto eldiris ion alian, "maldiplomatan", ol li "diplomate" antaŭpreparis. Ke la "urugvajaj menuoj" obsedis lin, montras ankaŭ unu el la skizoj de parolado: sur tiu paperfolio li per krajono aldonis margene "oni eĉ ne povus kunmeti /en Esperanto/ bonan urugvajan menuon".

(ii) Estas ankaŭ eble, eĉ pli verŝajne, ke la nuna teksto estas editorita versio de tio, kion li fakte diris. Kiel konate, en ĉiuj interŝtataj organizaĵoj (kaj en diplomatio ĝenerale) oni sendas la tekstojn de paroladoj kaj intervenoj al la delegito/reprezentantoj, kiuj faris ilin, por ke ili eventuale korektu la tekstojn antaŭ la publikigo en la oficialaj dokumentoj. Se oni konsideras la bruegon, kiun kaŭzis lia interveno, kaj la embarason, kiun li kreis per ĝi por si mem kaj por la dana registaro, oni povas esti preskaŭ certa, ke la nuna teksto estas esence ŝanĝita protokolo (surbendigita) rilate la eron pri la urugvajaj menuoj. Cetere, tiu ero logike sekvas (laŭ lia pensmaniero, kompreneble) post la ero pri la hotelĉambroj, ĉar mencio de hoteloj necese elvokas ideon pri restoracioj, precipe en menso de nelerta oratoro ne kapabla regi siajn pensojn, krome ekscitita kaj en tia stato elviviganta sian malamon al Esperanto, pri kiu li fakte sciis nenion. Post tio sekvas la kontraŭtezo "Et quand on nous parle..." ("Kaj kiam oni parolas al ni..."), en kiu verŝajne la originala "mais" (sed) estas sufiĉe nelerte ŝanĝita al "et" (kaj). Evidente, en tia kunteksto la parolada strukturo estas: "Ĝi /Esperanto/ sendube povas servi por peti hotelĉambron en la 5 aŭ 6 mondopartoj aŭ por kunmeti urugvajan menuon. Sed kiam oni parolas al ni pri tradukoj de Dante, de Shakespeare...".

(iii) Tuj post la finiĝo de la Konferenco mi klopodis havigi kopion de ĉiuj magnetofone registritaj partoj rilatantaj al Esperanto. La Sekretariato donis al mi kopion de tiu parto de la plenkunsido de la 10-a de decembro, kiu rilatis al la diskuto pri Esperanto kaj la fina akcepto de la Rezolucio (mi plu konservas ĝin), sed sub diversaj pretekstoj rifuzis doni al mi sonbendan kopion de la debato en la Programkomisiono kun la interveno de Blinkenberg. Pro la tuta atmosfero de tiu kunsido, hontinda ne nur por Blinkenberg, sed ankaŭ por la plimulto de la ĉeestantaj delegitoj - ridoj de ignorantoj ja eksplodadis post la mencioj de la "urugvajaj menuoj", la "amantoj" kaj aliloke - tio estas tute komprenebla. Sed la ridoj jam delonge estis ĉesintaj, kiam la 10-an de decembro, en atmosfero plej solena kaj digna, en la ĉeesto de ĉiuj ĉefoj de delegacioj, la Ĝenerala Konferenco en sia lasta plenkunsido akceptis la Rezolucion. La dosiero de Prof. Blinkenberg en la Ŝtata kaj Universitata Biblioteko de Arhus ne povas ŝanĝi historian fakton.

82.4 Prilingva Postnoto

Kvankam lingvoprofesoro, Prof. Blinkenberg montris per siaj malfeliĉaj urugvajaj menuoj en kiu ajn el la versioj, ke li nenion komprenas pri la rilato inter lingvo kaj socio. Se io estas netradukebla en la vera senco de la vorto "traduki", tio estas la nacilingvaj nomoj de specife naciaj/etnaj objektoj aŭ nocioj, por kiuj, ĝuste pro la specifeco, ne ekzistas esprimoj en aliaj lingvoj. Al tiu kategorio apartenas ankaŭ la nomoj de specife naciaj aŭ eĉ nur regionaj/lokalaj manĝaĵoj. La italaj *pizza*, *spaghetti*, *maccheroni*, *cannelloni* ktp., aŭ ĉevab, *čevapčić*, *sarma* ktp. en la jugoslavaj lingvoj, kaj simile en ĉiuj aliaj, estas netradukeblaj. En

aliaj lingvoj plej ofte ili estas uzataj en la originala formo, en restoraciaj menuoj kutime kun nacilingvaj mencioj pri la ingrediencoj. Esperanto ankaŭ tiurilate superas la naciajn lingvojn, ĉar eĉ tiaj vortoj povas esti facile kaj sukcese asimilitaj: spageto/j/, makaronio/j/, kanelono/j/, pico/j/, sarmo/j/, ĉevabo/j/, ĉevabeto/j/ ktp., el kiuj pluraj jam troviĝas en *Plena Ilustrita Vortaro*, dum aliaj povas esti laŭbezone asimilitaj sen komplikadoj. Tial la elekto de la "urugvajaj menuoj" fare de Prof. Blinkenberg estis komplete maltrafa ankaŭ el pure lingvistika vidpunkto. Per ĝi li celis ridindigi la kulturajn atingojn kaj potencialojn de tiu, laŭ li, "primitiva lingvo", sed fakte li kompromitis siajn lingvosciencajn sciojn kaj ridindigis sin mem.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 22. 3. 4 de Esperanto en Perspektivo.

83. SOVETIISMA PROPAGANDO EN LA NEDERLANDA KEG

"Rusoj pri Paco" estas la titolo, sub kiu en la nederlanda *Komuna Esperanto-Gazeto* (KEG) aperis komence de 1984 en Esperanto-traduko la "Alvoko" de la Supera Soveto de USSR kaj de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Soveta Unio de la 22-a de decembro 1982 "al Parlamentanoj, Registaroj, Politikaj Partioj kaj Popoloj de la Mondo". Temas pri unu plia en la longa vico de sovetiismaj propagandaj/agitadaj aktoj celantaj altiri la simpatiojn de la "pacifistoj en la burĝa kampo", "senmoraligi la malamikon" kaj tiel malfortigi ĝian rezistokapablon, kiel Lenin aperte deklaris jam en 1922. Kun la escepto de kompletaj politikaj ignorantoj, al tiaj pure propagandaj/agitadaj materialoj neniu plu kredas, inkluzive, espereble, la grandan plimulton de la legantoj de KEG.

Estas vero, ke la Alvoko aperis en tiu parto de KEG, kiu estas rezervita por FLE kaj redaktata de ĝi, sed tio ne multon ŝanĝas en la afero. Cetere, estas dubinde, ĉu la demokrataj nederlandaj laboristoj-esperantistoj estis tre feliĉaj vidi tian tekston en sia parto de KEG. Estu kiel ajn, D-ro P.H. van Terwisga, membro de Nederlanda Esperanto-Asocio (NEA), trafe reagis per mallonga letero, kiu aperis en la aprila n-ro de KEG. Nun okazis io preskaŭ nekredebla. Anstataŭ danki al D-ro van Terwisga pro lia reago, la estraro de NEA sendis al li la 15-an de majo 1984 riproĉan leteron, en kiu estis, interalie, dirite:

"Ni devas komuniki al vi, ke ni en nia estrarkunveno de la 9-a de majo 1984 kun iom da bedaŭro preparolis vian artikolon en la aprila n-ro de KEG, "Rusoj pri Paco". Ni devis opinii, ke la enhavo de tiu artikolo transiris la neŭtralecon de nia societo..."

Do, laŭ la opinio de la estraro de NEA, aliĝinta asocio de UEA kun sidejo en Nederlando, publikigi en KEG sovetiisman partipolitikan propagandon estas tute en ordo, sed reagi (eĉ ne per "artikolo", sed per kelklinia letero) signifas "transiron de neŭtraleco" de NEA, do kontraŭneŭtralecan agon!

Okazis plia korespondado inter D-ro van Terwisga, kiu postulis pardonpeton pro tiu ofenda riproĉo de la estraro, unuflanke, kaj la sekretario de NEA, D-ro Verloren van Themaat, kiu preteratentis tiun pravan postulon, aliflanke. Estu citita nur esence grava parteto el la letero de D-ro van Terwisga de 29.07.84 al la estraro de NEA:

"Cetere ŝajnas al mi tre dezirinde, ke la aranĝo koncerne la kunlaboradon inter la partoprenantaj organizaĵoj en KEG estu ŝanĝita. Se unu el la partioj (kiel la sola) pretendas havi la rajton esti politike neneŭtrala kaj vi kontestas al mi la rajton reagi, mi certe nuligos mian abonon kaj ekŝigos el membreco. Se, kontraŭe, vi kontentas esti kunvojaĝantoj de la sovetiistoj, estas via afero. Mi, tamen, certe ne kuniros tian vojon, kiu ŝajnas al mi treege malfavora al la Esperanto-Movado (ekster la komunistaj landoj)".

Pri tiu tuta afero aperis nenio en KEG. Kion pensas pri tio la membroj de NEA, la kristanoj en KUNE kaj ankaŭ la laboristoj en FLE ?

84. KONTRAKTO PRI KUNLABORO INTER UEA KAJ LA SOVETIISMA MEM

Dum la Universala Kongreso de UEA en Budapeŝto (1983) la reprezentantoj de tiu Asocio, D-roj H. Tonkin kaj R. Corsetti, renkontiĝis kun S-ro Romeŝ Ĉandra, prezidanto de Monda Packonsilio, la ĉefa el la dek plej gravaj sovetiismaj t.n. frontorganizaĵoj. *Kongresa Budapeŝta Informilo*, n-ro 1 de 30.07.83 sciigis tion diklitere sur la unua paĝo sub granda titolo "NOVAJ PAŜOJ AL ESTONTO" (v. p.149 en *Horizonto* n-ro 6/1984). Fakte, ne temis pri "novaj paŝoj", sed pri plia paŝo sur la descenda vojo de politikigo de UEA. Ĝi komenciĝis en Hamburgo (1974) kaj nun kondukis eĉ al formala kontrakto pri kunlaboro inter UEA kaj la t.n. Mondpaca Esperanto-Movado, filio de la Monda Packonsilio, siavice sklavece sekvanta la sovetiisman partipolitikan linion. Tio okazis dum la pasinta UK en Vankuvro, kiel informis *Esperanto* en n-ro 9/84 sur p. 152. Verŝajne ĝi estas unu el la pliaj "novaj paŝoj" interkonsentitaj kun la prezidanto de la Monda Packonsilio, kiujn tiel klare kaj pompe antaŭanoncis *Kongresa Budapeŝta Informilo* en 1983.

Tia kruda malobservo de neŭtraleco - fakte nur aperta formaligo de la jam ekde Hamburgo praktikataj kontraŭneŭtralecaj agadoj - neniam okazis, nek estus povinta okazi antaŭ la eventoj de 1974. La antaŭa Statuto de UEA, strikte observata de la tiamaj komitatoj kaj estraroj de la Asocio, ja permesadis en Art. 16 kontraktojn pri kunlaboro kun internaciaj neneŭtralaj Esperanto-Asocioj, sed nur "*kondiĉe ke tiuj rilatoj ne estu en kontraŭeco kun la principo de Art. 4*", t.e. kun la principo de neŭtraleco, klare kaj precize formulita en la tiamaj Art. 4. Intertempe ambaŭ artikoloj - 16 kaj 4 - estas radikale ŝanĝitaj kun la evidenta celo malfermi la pordon al neneŭtralaj, eĉ ideologie kontraŭneŭtralecaj organizaĵoj, ĉu en formo de aliĝo, ĉu en tiu de kontrakto pri kunlaboro. Cetere, kial la estraro de UEA ne publikigas tiun kontrakton ? Ĉu en la Komitato de UEA neniuj kontraŭstaris la aprobon ? Kiom da komitatanoj, fakte, voĉdonis por la aprobo, kaj kiom kontraŭ, kaj ĉu ne ĉiuj komitatanoj el la blokaj landoj voĉdonis por ? Ne sole la membroj de UEA, sed ankaŭ aliaj esperantistoj, en kies nomo UEA plu pretendas paroli, rajtas plene sciigi pri la vero. Almenaŭ la individuaj membroj, kiuj formas la kernon de la Asocio kaj kreas ĝian financon bazon, povus kaj devus postuli klarigon pri tiu plia kruda kontraŭneŭtraleca ago. Ili ja estas la ĉefa kaj esenca parto en la strukturo de UEA. Tial, unuavice en ilia nomo oni faras tiajn kompromitajn kaj, krome, plene superfluaĵajn kontraktojn kaŭzantajn nur malbonon, eĉ ne erecon da bono por Esperanto.

La eroj 83 kaj 84 kompletigas ĉap. 15.2.25 kaj ĉap. 18.2.1 de Esperanto en Perspektivo.

FONDAĴO IVO LAPENNA

Dum nia bela festo en Palaco de Grafo Moltke la 15-an de decembro Prof. D-ro Paul Neergaard havis la plezuron povi transdoni al Prof. D-ro Ivo Lapenna la sumon de dek mil danaj kronoj por establo de fondaĵo portanta lian nomon. Ses esperantistoj kontribuis al tiu donaco. Ĉiuj deziras resti anonimaj. La plej grava celo de la Fondaĵo estas informi vaste pri la laboro de la *Neŭtrala Esperanto-Movado*, i.a. per sendado de nia revuo *Horizonto* al nepagipovaj landoj.

Ĉiuj povas kontribui al la kresko de la Fondaĵo. Ni kore dankas al la unua: Ing. Ivo Godek, kunfondinto kun Ivo Lapenna de Studenta Esperanto-Klubo en Zagreb, kiu donacis 60 danajn kronojn.



11-a INTERNACIA KONFERENCO de la NEŬTRALA ESPERANTO - MOVADO

Metz (Francio)

27. julio - 2. aŭgusto 1985

Konstanta adreso:

M. de Zilah, 39 rue Joseph Hénoc, F-57070 METZ
telf. 8 765 3985 pĉk. 262033W Nancy

ĈEFTEMO: "Humaneca Internaciismo"

KONSTANTA TEMO de la pasintaj, nuna kaj proksima konferencoj:
"Renkonte al la Jubilea Jaro 1987".

BAZAJ LABORDOKUMENTOJ:

Statuto de ICNEM, Regularo de la Internaciaj Konferencoj
de N.E.M., Baza (Kadra) Programo por la Jubilea
Esperanto-Jaro 1887-1987.

PROGRAMO

(Preskaŭ definitiva)

SABATO 27.07.

- 13.00a h. : Hotelo "Ibis": Akcepto de la konferencanoj, kiuj loĝas en hotelo "Ibis".
- 14.00a h. : Hotelo Frantel: Komuna kunsido de LOK, Plenumkomitato de ICNEM kaj redakcio/administracio de *Horizonto*, aparta tagordo.
- 15.00a h. : Les Récollets, kanonikara salonego:
Akcepto de ĉiuj konferencanoj, informoj, konstanta filmo pri Metz.
- 18.30a h. : " Akcepto de ĵurnalistoj.
- 20.00a h. : " Interkona vespermango.

DIMANĈO 28.07.

09.00a h. : Les Récollets, "granda granejo":

Solena Inaŭguro de la Konferenco:

1. Salutvortoj de la prezidanto de LOK kaj reprezentantoj de la aŭtoritatoj,
2. Salutvortoj de delegitoj de la reprezentitaj landoj,
3. Bonveniga parolado de D-ro Eugène de Zilah al la reprezentantoj de kulturaj asocioj,
4. Elekto de la Konferenca Prezidentaro,
5. Inaŭgura Parolado de Prof. D-ro Ivo Lapenna pri "Nia Rolo en la Jubilea Jaro".

15.00a h. : " Gvidado tra la urbo Metz, startpunkto "Les Récollets".

15.00a h. : " Unua internacia forumo de M.F.K.A.

LUNDO 29.07.

09.00a h. : Les Récollets, "granda granejo":

"Eblecoj de 'Humanisma Internaciismo' en la Orient-Eŭropa Esperanto-Movado", prelego de Walter Zelazny. Mallonga diskuto.

10.30a h. : "

"Ekologio kaj Humanismo", prelego de D-ro Hrsto Marinov. Mallonga diskuto.

14.00a h. : Les Récollets, "kvadrata salono":

Ĉefkunveno de Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj.

15.15a h. : "

Ĉefkunveno de Tutmonda Esperantista Biblioteka Asocio (TEBA).

16.30a h. : "

Simpozio de Filozofia Asocio Tutmonda (FAT).

(Noto: La konferencanoj, kiuj ne estas membroj de IEAJ, TEBA aŭ de FAT, estas bonvenaj kiel observantoj).

21.00a h. : Les Récollets, "granda granejo": Teatraĵo.

MARDO 30.07.

09.00a h. : Les Récollets, "granda granejo":

1-a Ĝenerala kunveno

15.00a h. : "

Ĉefkunveno de ICNEM. Tagordo laŭ la Statuto. (Noto: La konferencanoj, kiuj ne estas membroj de ICNEM, estas bonvenaj kiel observantoj).

21.00a h. : Preĝejo St-Maximin: Metz-a Gregoria Ĉantgrupo (daŭro 1.30 h).

MERKREDO 31.07.

Tuttaga ekskurso al la batalkampoj de Verdun kaj malkovro de la "Skolo de Nancio".

ĴAŬDO 01.08.

09.00a h. : Les Récollets, "granda granejo":

"Esperanto kiel Lingva Esprimo de Humaneca Internaciismo", prelego de Prof. D-ro Ivo Lapenna. Mallonga diskuto.

10.30a h. : "

"Interna Ideo de Esperanto kaj Humaneca Internaciismo", prelego de D-ro Eugène de Zilah. Mallonga diskuto.

19.00a h. : Hotelo Frantel:

Bankedo kaj balo.

VENDREDO 02.08.

09.30a h. : Les Récollets, "granda granejo":

"Internacia Humanismo kaj Edukado", prelego de Prof. Evaldo Pauli.

11.00a h. : "

Ĉefkunveno de ICNEM (daŭrigo).

15.00a h. : "


2-a Ĝenerala Kunveno (se necese).

21.00a h. : "

Projekcio de la filmo de la Konferenco.

SABATO 03.08.

09.00a h. : Les Récollets, "granda granejo": Ferma kunsido. Tagordo komunikota.



WALTER ZELAZNY

Walter Zelazny naskiĝis en 1950 en Pollando. Li studis teorion kaj historion de ŝtato kaj juro en Maria-Sklodowska Curie Universitato. Poste li dediĉis sin al aŭtodidaktaj studoj pri esperantologio kaj sociaj doktrinoj. Li esperantistiĝis en 1973.

Li profesie laboris kiel ĵurnalisto, poste kiel funkciulo en socialismaj asocioj de studentoj kaj junularo en Pollando ĝis kiam oni abrupte maldungis lin pro "manko de politika konscio kaj partia subordiĝo". Ekde 1976 li loĝis en vilaĝo, kie li laboris kiel artforĝisto. Invitita al Centro de Dokumentado kaj Studoj pri la Internacia Lingvo en La Chaux-de-Fonds (Svisio), li staĝis tie, sed lige kun la politikaj eventoj en Pollando li revenis en 1980 Varsovion. Dum la mallonga periodo de politika malstreĉiĝo li tute dediĉis sin al Esperanto. En 1981 oni elektis lin al la estraro de Pola Esperanto-Asocio.

En la Esperanto-Movado li estis: vicprezidanto de la Pola Studenta Esperanto-Movado, estrarano de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, ĉefredaktoro de *Pola Esperantisto*, direktoro de la buroo de PEA, direktoro de la Esplorkleriga Centro de PEA, plenrajtigita estrarano de PEA. Li estis kunorganizanto de multaj interlingvistikaj, esperantologiaj kaj kulturaj seminarioj, studrondoj ktp. Li kontribuis per artikoloj al *Pola Esperantisto*, *La Kancerkliniko*, *Literatura Foiro*, *Monato*. Li verkis du eseojn pri Zamenhofaj lingva kaj socia pensoj: "Doktrino de Zamenhof" kaj "La 'Neŭtral-' Paradigmo en la Verkaro de Zamenhof", kaj du librojn: "Kio Estos Jam Okazis" (neeldonita pro ekesto de la milita stato) kaj pollingve "Giermkizm-Kotarbizm" (konfiskita en 1981). Ekde la fino de 1984 li loĝas en Francio. Nun en Metz li klopodas starigi la eldoncentron de la Monda Federacio de Kulturaj Asocioj.

Dum la 11-a Konferenco de N.E.M. li prelegos pri la temo: "Eblecoj de 'Humaneca Internaciismo' en la Orient-Eŭropa Esperanto-Movado".

Eugène de Zilah

BRILA FESTO OMAĜE AL IVO LAPENNA

La 15-an de decembro 1984 okazis en Palaco de Grafo Moltke, Kopenhago, festa vespero por memorigi la 125-jaran datrevenon de la naskiĝo de D-ro L.L. Zamenhof kaj la 30-jaran datrevenon de la Rezolucio de Unesko favore al Esperanto de la 10-a de decembro 1954. La festo, organizita de Prof. D-ro Paul Neergaard kun la helpo de la Kopenhaga *Horizonto*-Grupo, omaĝe al Ivo Lapenna, brile sukcesis. Partoprenis eminentaj esperantistoj - verkistoj, sciencistoj kaj artistoj - el sep landoj. Raporto kaj impresoj aperos en la sekvanta numero de *Horizonto*.

POR PACO EN LIBERECO - POR LIBERECO EN PACO

PRUDENTO POR ESPERANTO

Cirkulera artikolo sub ĉi tiu titolo estis pasintjare enmetita en la julio/aŭgusto-numeron de *Horizonto*, n-ro 46.

Ĉe la fino de nia artikolo "Prudento por Esperanto" ni pledis por diskuto sub gvidado de plejeble senpartieca prezidanto inter, unuflanke la prezidanto de UEA, s-ro G. Maertens, kun la redaktorino de "Heroldo de Esperanto", s-ino A. Fighiera-Sikorska kaj, aliflanke, profesoro I. Lapenna kun persono elektota de li mem. Nia opinio tia diskutado povus pliklarigi kaj pli malpli - eble tute-solvi la krizon en la Esperanto-Movado, kiu respeguliĝas en la nunaj karaktero kaj agado de UEA kaj, lige kun tio, en la morale nepermesebla konduto al prof. Lapenna, precipe fare de "Heroldo de Esperanto".

Post legado de nia artikolo prof. Lapenna deklaris sin preta partopreni en tia diskutado.

La 17-an de aŭgusto 1983 ni sendis la sekvan registritan leteron al sinjoro G. Maertens, prezidanto de UEA kaj al sinjorino A. Fighiera-Sikorska, redaktorino de "Heroldo de Esperanto":

"Koncerne: la dokumenton "Prudento por Esperanto"

Ĉi-enferme ni sendas al vi la supre menciitan dokumenton, kiun ni verkis je persona titolo.

Samtempe ni havigas al vi fotokopion de listo sur kiu 26 aliaj personoj aprobe kunsubskribis la tekston.

En la lastaj alineoj de la dokumento estas prezentita serioza kaj grava propono.

Nia demando al vi estas, ĉu vi akceptas ĉi tiun proponon, do ĉu vi estas preta kunlabori por realigi ĝin.

Atendante vian respondon antaŭ la 1-a de novembro 1983 al unu el la ĉi-subaj subskribintoj, ni estas,"

Subskribis: S-ino M.H. Vermaas
F. Munniksma

S-ino A. Fighiera-Sikorska retrosendis tutan nian materialon la 22.08.83 (laŭ la stampo sur la poŝmarkoj), do fakte poŝtrevene kaj sen ia ajn respondo aŭ komento.

Sinjoro Maertens sendis al ni leteron datitan 27.10.83 kun jena teksto:

"Estimataj,

Mi bonorde ricevis vian leteron de la 17.08.1983, kun aldono.

Post legado, mi devis ignori ĝin pro la ne-akceptebla kalumniado, sed vi misuzis nun la delegitan reton de Universala Esperanto-Asocio en Nederlando por diskonigo de la sama teksto.

Tial mi nun respondas al vi.

La enhavo de la dokumento "Prudento por Esperanto" atestas pri tute erara taksado de la nuna situacio en la Esperanto-movado kaj en Universala Esperanto-Asocio.

Cetere, de kelkaj senbazaj asertoj ofendiĝis talentaj homoj en la nuna movado.

Sub tiaj premisoj mi evidente ne povas akcepti la inviton por debati; aliflanke, malgraŭ mia respekto por D-ro Prof. Lapenna, mi opinias ke mi dediĉu mian tempon plene al la evoluigo de la asocio kies prezidanto mi estas.

Fine, kvankam via letero ne finiĝis per la kutima saluto, mi jes sincere salutas vin."

Subskribis: G. Maertens

Ni respondis al sinjoro Maertens per nia jena letero de 07.11.83:

"Estimata sinjoro Maertens, Koncerne: "Prudento por Esperanto"

Ni ricevis vian leteron de 27.10.83, al kiu ni respondas jene.

Ni emfazas ke nia artikolo "Prudento por Esperanto" baziĝas sur kontroleblaj faktoj. Tial estas enigma al ni via kulpigo ke ni kalumniis, do mensogis, kaj ofendis. Via sinteno estus kredinda se vi estus reaginta al niaj argumentoj kaj al la faktoj kiujn ni menciis. La aserto ke ni "misuzis la delegitan reton de UEA en Nederlando" estas okulfrappe senbaza. Se en demokrata jurkomunaĵo oni deziras preni kontakton kun ekz. membroj de la registaro por informi ilin pri iu temo, oni tute normale uzas la ekzistantajn adresojn. Estas ĝuste fermiteco aŭ nefermiteco kiu decidas pri la kvalito de socio, kaj tio validas ankaŭ pri organizaĵoj. Ni ricevas la impreson ke vi evitas la nefermitecon kaj timas ke delegitoj kaj aliaj personoj en UEA aŭdos ankaŭ kritikajn sonojn. Tiu t.n. "misuzo" de la delegita reto do ŝajnas al ni ridiga preteksto por via malfrua, pli malpli konfuzita reago.

Vi diras ke en nia artikolo ni tute erare taksas la nunan situacion en la Esperanto-movado. Denove: kial vi ne klarigas vian aserton, samtempe konigante viajn proprajn vidpunktojn kaj argumentojn?

Ni aprezas vian respekton por Prof. Lapenna, sed tiu nia aprezo paliĝas tuj kiam ni konstatas ke vi, kaj kun vi kompreneble pluraj aliaj, tute ignoras liajn sencensajn avertojn kaj argumentojn.

Vi ja pravas, dirante ke vi devas dediĉi vian tempon plene al la evoluigo de la asocio kies prezidanto vi estas. Ĝuste tiu evoluigo bezonas konstantan flegadon, speciale fare de la respondeculoj en UEA. Ĉi tiu koncepto de evoluigo sen ia dubo unufoje antaŭsupozas liberan interŝanĝadon de ideoj kaj opinioj, kiel ankaŭ stimulado de la membroj al kritika kaj sendependa pensado. Oni ne povas sufiĉe akcenti tion en tempo kiam oni rememoras la verkinton de la multilate profeta libro "1984". Ja ne lastloke por tiu celo Zamenhof kreis kaj donacis sian Esperanton.

La laboro kaj kreemo de la membroj de komunaĵo konsistigas ties forton. Ili eblas nur surbaze de daŭre stimulata interkomunikado. Nu, la kanaloj de interkomunikado en UEA estas ŝtopitaj. Depost 1976 la revuo *Horizonto* sencense avertis kontraŭ ĉi tiu danĝera cenzuro sed, kiom ni scias, ĝis nun neniu el la UEA-respondeculoj, inter ili vi, eĉ nur klopodis rompi la sisteman sufokadon. Vere, se vi volas evoluigi la Asocion, laŭ la plej bonaj tradicioj de Zamenhof, Privat, Hodler k.a., vi profunde konsciu ke libera sencenzura interkomunikado formas ĝian vivsangon. Ke tio inkluzivas ankaŭ la rajton pri repliko al personaj atakoj, estas evidenta. Sendube, grava tasko kuŝas antaŭ vi!

Via letero de 27.10.83 estas fuĝema kaj tial sendigna "respondo" al "Prudento por Esperanto", respondo kiun oni ne povas akcepti de gvidanto de kultura kaj humanisma mondorganizo. Pro tio ni petas vin, ankoraŭfoje reagi, t.e. per argumentoj, kaj konsideri nian proponon diskuti kun Prof. Lapenna, kiu intertempe konsentis. Ni volonte atendos vian respondon antaŭ la 1-a de decembro proksima.

Ni ŝatas ke vi deziras "sincere saluti nin", kion ni kompreneble reciprokas. Sed ni tuj aldonu ke nura "sincerumado" - da kiu ja estas abundo, ankaŭ en Esperantio - estas pala vorto se ĝin ne sekvas agoj. Alidire: sincereco ŝuldiĝas.

En ĉi tiu spirito ni sendas al vi nian sinceran saluton."

Subskribis: S-ino M.H. Vermaas
F. Munniksma

11-a INTERNACIA KONFERENCO
de la
NEŬTRALA ESPERANTO - MOVADO

Metz (Francio)

27. julio - 2. aŭgusto 1985

Aliĝu al

Konstanta adreso:

M. de Zilah, 39 rue Joseph Hénot, F-57070 METZ
telf. 8 765 3985 p&k. 382033W Nancy

Pro poŝta striko en Nederlando la sendo de nia ĉi-supra letero malfruiĝis, kion ni klarigis al sinjoro Maertens en 28.11.83:

"Estimata sinjoro Maertens,

La sendo de nia ĉi-enfermita letero de 07.11.83 konsiderinde malfruiĝis, ĉar ni devis reteni ĝin sekve de ĝenerala poŝta striko en Nederlando, kiu nun ĉesis. Sub ĉi tiu cirkonstanco ni volus peti vin respondi al nia menciita letero antaŭ la fino de decembro 1983.

Antaŭdanke kaj salute,

ankaŭ en la nomo de s-ino M.H. Vermaas"

subskribis: F. Munniksma

Sinjoro Maertens ne respondis al nia letero de 07.11.83.

Ni dissendis nombron da ekzempleroj de "Prudento por Esperanto" ankaŭ al membroj de la Akademio de Esperanto, UEA-komitatoj, ĉefdelegitoj, delegitoj, perantoj, landaj asocioj, fakaj asocioj, honoraj membroj, redakcioj de Esperanto-periodaĵoj, Esperanto-eldonejoj, unuopaj personoj ktp.

POSTPAROLO

Kvankam ni en la artikolo petis pri aprobo de nia diskutpropono kaj aldonis respondslipon tiucele, iuj aprobantoj kaj malaprobantoj laŭdas kaj kritikas profesoron Lapenna, tamen ne pridubante ties grandajn meritojn por la afero de Esperanto. Estas ĝojiga fakto ke tiuj respondintoj senescepte sopiras al finiĝo de la antagonismoj, sed estas firme konvinkitaj ke tia "konkordo" ne povas esti aĉetita je ĉia kosto; ke ĝi male devus havi realan bazon, kiu, ni emfaze ripetu, antaŭ ĉio konsistas el libera interŝanĝado de opinioj - elementa homrajto - kaj el strikta politika senpartieco de UEA, konforme al ĝia iama statuto.

Nun kiam la prezidanto de UEA kaj la redaktoro de "Heroldo de Esperanto" krude malakceptis nian proponon, ni demandas al ni ĉu la tuta UEA-membraro kaj la "Heroldo"-legantaro aprobus tian sintenon. Ĉiukaze oni ne informis la legantaron de "Esperanto" kaj "Heroldo", kio estas danĝera misuzo de potenco. Post ia tempo la mizeraj sekvoj de tia agado sendube manifestiĝos. Oni ja tre facile povas observi en la mondo ĉirkaŭe kion signifas sistema manipulado de homoj per retenata kaj/aŭ tordata komunikado.

Iniciatante ĉi tiun agadon, ni taksis la ŝancon ke nia propono pri diskuto estos akceptita de la koncernaj personoj ne granda. Tamen, ni opiniis la klopodon necesa, por sondi la opinion de reprezenta parto de la esperantistaro kaj por fiksi, por la historio de la Esperanto-Movado, la sintenon de personoj rolantaj en difinitaj funkcioj dum minace-grava periodo de tiu movado. Nun ni havas la pruvon ke du el la tri koncernaj personoj, nome s-ino Fighiera-Sikorska kaj sinjoro Maertens, kondutis centprocente negative.

03.05.84

S-ino M.H. Vermaas
F. Munniksma

/Redakcia noto: Pro la tro abunda materialo kaj tro limigita spaco, la supra dokumento, ricevita de la redakcio jam fine de majo 1984, povas aperi nur nun. La redakcio pardonpetas al la geverkintoj. Cetere, la dokumento havas daŭran historian valoron./

PREĜO DE UNU PATRINO

*Mia Glennĉjo plu amata,
Kie do vi estas nun ?
Ĉu anĝelo delikata,
Vi flugetas sub la lun' ?
Eble kun kamaradetoj
Vi taŭzfaras al kometoj
Kaj vi forgesetis min,
Malproksime de Patrin'.
Ludu, ludu, mia ido,
Via estas la ĉiel',
Laŭte sonu via rido,
Mi ne volas esti brido
Al la ĝojo de anĝel'.
Sed mi petas, iom honta:
Je Kristnasko la venonta,
Kiam kun anĝela ĥor'
Vi alportos sur la teron
Pacon, amon kaj esperon
Por la bonvolula kor';
Kiam ĉiuj familioj
Gaje kantos ĉe abioj,
Kiam sub la vintra vent'
Ĉio haltos en atent',
Kiam sub kandelaj briloj
Elpakiĝos la ludiloj;
Kiam ploros mi, sen bru',
Antaŭ via eta ŝu',
Kiam aliula ĝojo
Min incitos kiel bojo;
Ho, ne pensu nur pri vi,
Zorgu iom nun pri mi:
Se mi vokos vian nomon,
Venu super mian domon
Kaj al mi, en mia sol',
Ĵetu iom da konsol';
Mi eksentu ion varman
Veni mian koron larman:
Ia kiso, nur kiset',
Jen por mi la sola pet',
Filo, kiun Dio prenis.
Sed mi scios, ke vi venis.*

B. Aunis

KRISTNASKO EN ALZACO

*Ĵus aperis nova stel'
Verda kiel la espero,
Kaj ĝi brilas en ĉiel'
Plenigita de mistero.
Ĉi al ni sciigas, ke
Ĵus naskiĝis en Jude'
Unu dia infaneto
Por la homa reaĉeto.*

*Ne plu restu en malĝoj'
Inter la malbonaj agoj,
Ĉar ekzistas unu voj':
Sekvu ĝin, ho reĝaj magoj.
Malsaĝuloj mokas vin:
"Kien do ĉi tiuj iras?"
Sed vi trovos en la fin',
Tiun, kiun vi deziras.*

*Ne malhelpos la dezert',
Ne malhelpos malproksimo:
Vin fortigos dia cert',
Forigante vin el timo.
Post jarcentoj de mallum'
Stelo brilas tra la brum'.
Ĝi kondukas al Jesuo
Nia sola kora ĝuo.*

*La amuzaj siluetoj
De la ĉarmaj infanetoj
Kuras al la krip':
Por akcepti nian savon
Oni nure fosis kavon
En malgranda ŝtip'.*

*La azeno kaj la bovo
Lin varmigas per la blovo:
Bestoj estas pli
Kompatemaj ol la homoj,
Vin ĉasintaj el la domoj,
Ho vivanta Di'.*

*Sed kun via puranimo
Proksimiĝu do sen timo,
Infaneta ĥor'.
Ĉar vi estas sen riproĉo,
Kantu per sanktega voĉo
Pri la dia glori'.*

*Al la emiranta
samideano
Ivo Lapenna,
omaĝe
B. Aunis*

*Sonoriloj ĉie ĝojas,
Klingeling'!
Al preĝejoj ĉiuj vojas.
Klingeling'!
Kompatindaj filoj de Adam',
En Kristnaska tago ni forgesu
Eĉ senteton pri malam':
Dio granda ĝin al ni permesu.
Diras ni
Per grandega kri':
For la limoj!
For la krimoj!
Unuiĝu la animoj!*

*Sonoriloj ĉie ĝojas,
Klingeling'!
Al preĝejoj ĉiuj vojas.
Klingeling'!
En la granda gajo sur la ter'
La naturo nun al ni kuniĝas.
Ĉio plenas de esper',
Ke la homa koro mem vertiĝas.
Diras ni
Per granda kri':
Steloj, steloj,
Diaj belo,
Brilu nun en la ĉielo.*

Trad. B. Aunis

ONI JAM DIRIS ANTICIPE

D-ro István Nagy

La dialogo okazas surstrate. Du amikoj renkontiĝas. Julio estas esperantisto, Karlo nun simpatianto. Iam li lernis Esperanton, entuziasmis pri ĝi, sed iom post iom malproksimiĝis - kiel li diris - de la "porkongresa movado".

Karlo: Ĉaŭ Julio!

Julio: Saluton. Kial radias via vizaĝo pro ĝojo?

K.: Ĉar ni renkontiĝis. Jen, pruviĝis la antaŭdiro de la malamikoj de Esperanto!

J.: Kaj tio ĝojigas vin, kiu iam fervore laboris por Esperanto!

K.: Prave! Iam. Diru al mi, kiun Esperanton vi parolas nun: ĉu la naturalisman, naturisman aŭ la skemisman?

J.: La Zamenhofan. Tiun, kiun uzis kaj uzas niaj famaj verkistoj, lingvistoj, gvidantoj, oratoroj.

K.: Mi kolektis vortojn el via pura literaturo, permesu laŭtleĝi kelkajn: *aŭtem, ak, nam, ma, dos, tum, forsin, olim, enim, klude, erst, virko, supliki, vanui, ĉendi, friŝtiko, kindergarteno*; el alia verko: *ku, ko, ka, kom, kal, kes, kaŭ, doŭ, i, ki, ĉi, ti, pito, fro, hati, pon, sob*. Ĉu mi daŭrigu?

J.: Sed tiuj ne estas oficialaj vortoj. Kelkaj aŭtoroj pensas, ke ili per tiuj vortoj povas riĉigi la lingvon...

K.: ...ĉar tiel ĝi estos unueca kaj tutmonde komprenata, ĉu ne? Kion faros la Akademio, se estontece ankaŭ la ĉinaj, japanaj, vietnamaj, iranaj verkistoj komencos "riĉigi" Esperanton per siaj vortoj aŭ ŝanĝos la vortojn siaplaĉe?

J.: Ĉu vi volis tion diri al mi? Mi pensas, ke ne.

K.: Vi konas miajn pensojn. Cetere, ĉu vi jam forigis la akuzativon, la transitivecon de la verboj, la supersignojn kaj...

J.: Ne necesas. Esperanto tre bone funkcias per ili. Sed diru jam, kion vi volas komuniki tiel arde al mi?

K.: Jen *Budapeŝta Informilo*, centra organo de HEA, aprila numero 1984. Mi legas. "Pluraj ekzemploj de laŭmorfema tradukado troviĝas en la malgrandaj vortaroj nuntempe haveblaj en Hungario, kaj la disvastiĝo de tiuj hungarismoj en ĉiuspecaj publikigaĵoj donas al la Internacia Lingvo en Hungario *dialektan karakteron*".

J.: Miascie la vortarojn tiutempe kontrolis interalie J. Baghy kaj Kalocsay. Se mi bone memoras, laŭ *P/V* dialekto estas "speciala formo, kiun ricevas unu lingvo en certa regiono". Kiu skribis ĉi tiun dialektan stultaĵon?

K.: Stultaĵon? Akademiano Bernard Golden, la "faktotuma kaj ĉioscianta lingvisto", kiel mi legis pri li en *Hungara Vivo* ĉe mia amiko hazarde. Do, pravis la malamikoj de Esperanto, kiam ili prognozis, ke Esperanto disfalos en dialektojn. Kaj nun ĉi tiun aserton skribe pravas akademiano, fama lingvisto, konstanta premiito en literaturaj konkursoj, fenomeno en Esperantujo. Laŭ li la unua dialektiĝo jam okazis en Hungario.

J.: Kaj tion publikigas la oficiala informilo de la hungara movado? Nu, pro ĉi tiu artikolo Esperanto ne mortos. Tamen, ĉu akademiano ne povus okupiĝi pri aliaj aferoj ĝuste nun antaŭ la centjariĝo aŭ almenaŭ silenti dum iom da tempo.

BONDEZIROJN AL MONATO

Horizonto estis la unua, kiu per "plej lastmomente" aldonita slipo anoncis, ke la nelacigebla kaj kompetenta Stefan Maul venkis la krizon kaj ke MONATO ne mortos. Nun kun grandega plezuro ni informas ĉiujn niajn legantojn, ke MONATO plenvigle vivas kaj daŭrigas sian unikan rolon en la internacilingva komunaro.

Ĉiu esperantisto ĝojas pro tio, sed ne sufiĉas nur ĝoji. Necesas, ke ĉiu unuopa esperantisto, ĉiu loka Esperanto-societo, ĉiu instanco uzanta la Internacian Lingvon abonu ĝin tuj. MONATO meritas plenan apogon kaj en 1985 devus kaj facile povus havi ne centojn, sed kelkajn milojn da abonantoj.

Al MONATO ni deziras prosperan 1985 kaj senfine longan vivon post tio.

Redakcio kaj Administracio
de *Horizonto*

MONATO

internacia magazino sendependa

UNIKA REVUO EN ESPERANTO

Vere alternativa laŭ multaj aspektoj.

Unu el la plej prestiĝaj
esperanto-revuoj

Inform-riĉa, bele ilustrita.

Petu inform-materialon de:

MONATO, Frankrijklei 140
B-2000 Antwerpen, Belgio.

Li senhalte inventas neekzistantajn lingvajn problemojn kaj tiel sisteme provizas per argumentoj la kontraŭulojn.

K.: Kaj timinde, ke eble li jam dissendis la saman artikolon sub diversaj titoloj al dekoj da gazetoj aŭ verkas jam la premiotan eseon: "La nehaltigebla disfalo de Esperanto en dialektojn."

J.: Ĉio povos okazi. Hodiaŭ hungara dialekto, morgaŭ germana, angla, rusa, ĉina, portugala ktp. Vere, kial ne? Al tio sufiĉas nur kelkaj "malgrandaj Esperantaj vortaroj" - kiel li skribis.

K.: Per sia aserto li funde ofendis la hungarajn esperantistojn, la verkistojn, tradukistojn.

J.: Kiel eblas, ke pro "pluraj ekzemploj de laŭmorfema tradukado" estiĝas en iu lando: dialekto? Povas esti, ke la difino en *PIV* pri dialekto estas erara.

K.: Nu, vidu. Pro tiaj "savideanoj" kaj "lingvaj deformantoj" mi forlasis la movadon. Kion li celis per ĉi tiu fuŝartikolo? Eble li ne konscias, ke per liaj artikoloj, kiel *Verdaj Krokodiloj*, *Forigi la Transitivecon de la Verboj*, *Revuo-KLOAKO*, kiun li fondis, *Hungara Dialekto* ktp. li igas ridindaj la lingvon kaj movadon...

J.: ... kaj la Akademion. Ĉu vi ne tiel opinias?

K.: La esperantistaro havu ne nur puran lingvon, sed ankaŭ puran movadon. Nu... Ĝis kara amiko!

J.: Ĝis Karlo!

/Redakcia noto: La baza penso de la supra kontribuaĵo en formo de dialogo respondas al la starpunkto de ICNEM kaj Horizonto, kiuj senkompromise defendas kaj daŭrigos defendi la lingvan unuecon surbaze de la Fundamento./

ANKORAŬ PRI LA KONTRAŬFUNDAMENTA "FAR"

La FAR-malsano bedaŭrinde disvastiĝas. Tial necesas ankoraŭfoje atentigi ĉiujn, kiuj komprenas la absolute decidan gravecon de la Fundamento de Esperanto por la lingva unueco, ke FAR por indiki la aganton ĉe la pasivo estas krude kontraŭa al la Fundamento kaj al la spirito de Esperanto.

Kelkaj klopodis pravigi la uzon de FAR kiel prepozicio kaj donis la ekzemplojn de PER kaj PERE DE. La komparo kun PER kaj PERE DE (Plena Analiza Gramatiko § 138) ne ŝajnas al mi akceptebla, ĉar PER ja estas prepozicio, kaj el prepozicioj oni povas formi verbojn, adverbojn kaj substantivojn per aidono de respektivaj finaĵoj, sed ne inverse.

Ne povas esti dubo, ke laŭ la Fundamento (Reg. 6) la prepozicio ĉe la pasivo estas DE. En § 25 de la Ekzercaro troviĝas jenaj ekzemploj: "aĉetata de mi", "pagataj de mi", "kaŝita de vi". Se pro la multisenceco de DE la indiko de la aganto en la konataj ekzemploj ("manĝado de la muso de la kato" k.a.) povas kaŭzi miskomprenojn, oni uzu FARE DE, enkondukitan de Grosjean-Maupin jam en 1926 kaj poste vaste uzatan de bonaj sciantoj de Esperanto. FARE DE (eventuale FAR'DE analoge al DANK'AL) (i) estas konforma al la Fundamento, ĉar analizebla laŭ Regulo 6, (ii) ĝis antaŭ nelonge estis firme socie enradikiĝinta, (iii) en la parola lingvo estas multe pli klara kaj tial ankaŭ pli belsona, ol la nura FAR, precipe en kelkaj kuntekstoj. Eldiro de tri pliaj sonoj aŭ skribo de tri pliaj literoj por resti enkadre de la Fundamento kaj samtempe aldoni iom pli da sonoro al la belsona Esperanto - vere ne postulas tro da fortostreĉo.

Aldone: Entute troa mallongeco de vortoj aŭ superflua mallongigoj ne estas lingva avantaĝo, kiel iuj inklinas kredi, sed malavantaĝo el vidpunkto de komprenebleco. Tipa ekzemplo: la angla, precipe se parolata de anglalingvanoj.

En la intereso de la lingva unueco mi insiste rekomendas uzi la prepozicion DE por indiki la aganton konforme al Reg. 6 de la Fundamento kaj al ekzemploj en § 25 de la Ekzercaro; se la uzo de nur DE povus kaŭzi malklarecon aŭ eĉ miskomprenon, oni uzu FARE DE, eventuale FAR'DE (analoge al DANK'AL), nepre ne FAR. *Horizonto*, kiu rigore observas la Fundamenton, observos ankaŭ en la estonteco tiun regulon.

Membro de la Akademio de Esperanto

Noto: Represo de la supra teksto estas dezirinda.

EKZISTAS, AKTIVAS LA CENTRO DE N.E.M. - POR KE U.E.A. RETROVU SIN MEM

FELIĈAN JARON 1985

La Plenuma Komitato de ICNEM, la Redakcio kaj Administracio de *Horizonto* deziras al ĉiuj membroj, abonantoj kaj legantoj de *Horizonto* plej feliĉan Novan Jaron. Ĝi estu pli prospera ankaŭ por la tuta Esperanto-Movado.

LA PROTEKTO DE LA RAJTOJ DE MALLIBERIGITOJ

Prof. D-ro Stefanos Anagnostakis

La bonega prelego de Prof. D-ro Stefanos Anagnostakis aperis/aperos komplete en *Internacia Jura Revuo*, n-roj 2/1984 kaj 1/1985.

Red.



Kiel ni jam raportis en *Horizonto*, n-ro 5/84, p. 117, dum la 10-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado en Leeuwenhorst Prof. D-ro Stefanos Anagnostakis (Universitato de Tesaloniko, Grekio) prelegis pri la temo "La protekto de la rajtoj de malliberigitoj". Li klopodis, kiel eble plej simple prezenti la temon, komencante ĉe la Antikva Epoko kaj daŭrigante ĝis la koncernaj reguloj de la Ligo de Nacioj, de UN kaj de la Konsilantaro de Eŭropo. Poste li montris diversajn ekzemplojn de malobservoj de la rajtoj de malliberigitoj en 117 ŝtatoj (kaj de malliberigitoj pro ordinara krimagoj, kaj de politikaj malliberigitoj). Li analizis zorgeme kaj sisteme la karakteron de tiuj malobservoj kaj elmontris la rimedojn, kiujn oni devas apliki tutmonde por ĉesigi la ofte tragedian situacion, en kiu troviĝas nuntempe multaj homoj, kaj kiu - bedaŭrinde - tagon post tago disvastiĝas en multaj ŝtatoj de la mondo.

La unua parto de tiu prelego estas publikigita en la ĵus aperinta numero 2/1984 de *Internacia Jura Revuo* (organo de Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj). La daŭrigo aperos en n-ro 1/1985. Kiu deziras legi ĝin, povas peti provkzempleron aŭ fotokopion de la redaktoro de *IJR*, D-ro Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020 Graz, Aŭstrio.

UNUA MEMBRO-BONFARANTO DE ICNEM

S-ro Gösta Persson el Helsingborg (Svedio) ĵus fariĝis la unua Membro-Bonfaranto de Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado. Li partoprenis la 10-an Internacian Konferencon de N.E.M. en Leeuwenhorst kaj estis tiel impresita pro ĝia alta kultura nivelo kaj la tuta agordo de humaneca internaciismo, ke li decidiĝis helpi al ICNEM ankaŭ finance.

La kotizo de Membro-Bonfaranto, jam pagita de S-ro Persson, estas 2000 svisaj frankoj, kaj tiu de Membro-Apoganto 1000 svisaj frankoj, en ambaŭ kazoj unufoje por ĉiam. La pasintan jaron S-ro G. Becker, antaŭe Ĝenerala Sekretario de UEA, fariĝis Membro-Apoganto. Ĉu troviĝos aliaj, kiuj sekvos ilian ekzemplon?

Al ambaŭ ankaŭ publike tre koran dankon en la nomo de la Plenuma Komitato de ICNEM.

Rie Zacho
Kasisto de ICNEM

NOVA NUMERO DE INTERNACIA JURA REVUO

Fine de novembro aperis n-ro 2/84 de *Internacia Jura Revuo* (IJR), organo de Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj (IEAJ). Tiu ĉi 48-paĝa kajero plus kovrilpaĝoj enhavas en la unua loko la Deklaron Oĝa al Prof. D-ro Ivo Lapenna, publikigitan jam pli frue en *Monato*, *Horizonto*, *Israela Esperantisto* kaj aliaj periodaĵoj. La Enkonduka Rimarko de la redaktoro, D-ro K. Perko, kaj pluraj artikoloj estas dediĉitaj al Prof. Lapenna, kiu estis la fondinto de IEAJ en 1957 kaj restas ĝia prezidanto ekde tiam.

La artikoloj de Prof. Lapenna kaj H. Camos-Grez pritraktas la koncepton de jura persono laŭ la sovetia resp. ĉilia juro. Prof. Anagnostakis analizas la kriminalan respondecon de juraj personoj, speciale en Grekio. Aperis ankaŭ la unua parto de lia tre interesa prelego pri la rajtoj de malliberuloj, farita dum la lo-a Konferenco de N.E.M. en Nederlando. En la kajero troviĝas ankaŭ artikolo de D-ro K. Perko pri la sistemo de juraj fontoj kaj artikolo de Ralph Harry pri la juro de diplomaciaj rilatoj lige kun la mondkonata afero de St. James Square (Placo de Sankta Jakobo) en Londono, kiam londona policistino estis mortigita per kuglo pafita el Libia Buroo (ambasado). En la fina parto estas la kutimaj rubrikoj: rezenzoj, notoj kaj Oficiala Informilo de IEAJ.

Internacia Jura Revuo regule aperas du fojojn jare, ĉiam kun tre aktuala enhavo pri juraj demandoj interesaj por ĉiu klera homo. La artikoloj estas verkitaj en maniero facile komprenebla ankaŭ por edukitaj personoj sen juraj scioj. Ĝi sendube estas la plej bona faka periodaĵo en Esperanto kaj meritas havi multe pli da abonantoj kaj legantoj.

La jara kotizo por la membroj estas 150 aŭstriaĵ ŝilingoj, aŭ 5,50 anglaj pundoj, aŭ egalvaloro. La kotizo inkluzivas la abondon de *IJR*. *IJR* estas abonebla ankaŭ ekster la membreco, kaj la jara abono por du kajeroj, ĉiu de 48 paĝoj plus la kovrilpaĝoj, estas same tiel 150 aŭstriaĵ ŝilingoj aŭ egalvaloro.

La kotizojn kaj abonojn akceptas D-ro Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020 Graz, Aŭstrio, poŝta ĉekkonto n-ro 1257.845.

TUTMONDA ESPERANTA BIBLIOTEKISTA ASOCIO (T.E.B.A.)

Antaŭ deko da jaroj fondiĝis Internacia Esperanto-Asocio de Bibliotekistoj, sed bedaŭrinde pro tiama manko de laborfortoj la iniciato ne sukcesis.

Nun venas nova provo, sub la nomo Tutmonda Esperanta Bibliotekista Asocio, kun la deziro krei solidan bazon de tiu asocio antaŭ la centjariĝo de Esperanto.

La celoj de la Asocio estas kunligi esperantistojn-bibliotekistojn, diskonigi Esperanton pere de la bibliotekoj de la mondo, kaj per Esperanto helpi la laboron de ĉiaj bibliotekoj.

Ĉiuj interesigantoj, ankaŭ la posedantoj de privata Esperanto-kolekto, povas kontakti kun la Asocio pere de la adreso de la provizora sekretario. Eblas ankaŭ jam pagi la provizoran jarkotizon (por 1985) de £ 5 britaj, \$ 7 usonaj, aŭ egalvaloro proksimuma.

Geoffrey King
Provizora sekretario de TEBA
(vidu la adreson sub perantoj Britio)

INTERNACIA INFORM-SISTEMO

KAJ HOMAJ RAJTOJ

Stefan Maul



Resumo de prelego la 23-an de julio 1984 en Leeuwenhorst

La nuna internacia inform-sistemo, kiu plejparte - en la okcidenta hemisfero - baŝiĝas sur inform-agentejoj, lezas homajn rajtojn ĉefe pro la tendenco al sensacioj, laŭ la moto "bonaj novaĵoj estas nur malbonaj novaĵoj". Krome en la okcidenta hemisfero regas preskaŭ kompleta monopolo de usonaj inform-agentejoj, kiom koncernas internacian komunikadon. Al la problemo, ke eksterlandaj korespondantoj raportas el landoj kaj mond-regionoj, kiujn ili konas nur supraj, aldoniĝas la problemo, ke pro tiu ĉi monopolo la cetera mondo povas informiĝi nur per la okuloj de usonaj ĵurnalistoj, kaj nur pri tio, kio interesas usonajn inform-agentejojn aŭ kion ili taksas grava por informi la internacian publikon. Sistem-imanente do tia informado lezas homajn rajtojn kaj de individuoj kaj de popoloj, kiujn ĝi prezentas - pro la sensaciemo - erarige kaj false. Sed ĉi tiu inform-sistemo lezas ankaŭ la rajton de informiĝo, ĉar la ŝajne bone informata okcidentano ricevas nekompletan kaj malĝustan bildon de l' cetera mondo, precipe Azio, Afriko kaj Sudameriko.

Kvankam oni ne povas neglekti, ke ĉi tiu "esplor-ĵurnalismo", kiu ĉasas sensaciojn, ankaŭ havas meritojn kaj pro tio ne malprave estas nomata "kvara forto" (apud legislativo, ekzekutivo kaj jurisdikcio) de demokratia ŝtato, oni ne devas ne kritiki ĉi tiun konstantan malrespekton de homaj rajtoj, precipe kiom koncernas malgrandajn popolojn kaj la homojn en la tria mondo. Tamen la propono de nova inform-ordo, pri kiu oni diskutas en UNESKO, ne povas kontentigi, ĉar ĝi nuligus la funkcion de ĵurnalismo kiel "kvara forto".

Estas imagebla alternativo al la nuna inform-sistemo, alternativo kiu povus solvi la problemojn, forigi diskriminaciojn kaj garantii la homajn rajtojn je informado kaj informiĝo. Modestan modelon de tia alternativo prezentas la internacia magazino sendependa MONATO, por kiu raportas el la diversaj landoj nur indiĝenaj aŭtoroj, kiuj perfekte konas siajn landojn, kaj kiuj verkas nur originale en la internacia lingvo Esperanto. En tia informado ne tiom gravas sensacioj, sed la veraj problemoj kaj situacioj de homoj kaj popoloj. Krome pro la uzado de neŭtrala internacia lingvo forfalas ĉiuj lingvaj problemoj, kiuj ankaŭ kondukas al falsaĵoj en la nuna inform-sistemo. La spertoj pri MONATO pravas, ke helpe - kaj nur helpe de Esperanto - oni povas starigi pli justan internacian inform-sistemon, per kiu eblas multe pli bone garantii la respekton al homaj rajtoj, individuaj kaj popolaj.



"Agadi per lernolibroj, anoncoj, k.t.p. estas tre bone kaj necese; sed tio ĉi devas havi lokon *apud* la literaturo kaj ne *anstataŭ* la literaturo."

L. L. Zamenhof

LIBROJ SUB LA LUPEO

Redaktas Salvador Gumà, Paseo Prim, 38-7-6, Reus, Tarragona, Hispanio.

Internacia Lingva Komunikado,

Konferencaj Materialoj, T. Ejsmont. Eldonita de Studenta Esperanto-Rondo Scienca de la Universitato de Łódź, Łódź, 1983. 304 p. Prezo neindikita.

La verko enhavas la tekstojn de prelegoj kaj artikoloj de 16 aŭtoroj, faritaj aŭ legitaj dum unu el la jam konataj konferencoj de la tre aktiva Studenta Esperanto-Rondo Scienca en la Universitato de Łódź, Pollando. La kontribuadoj estas presitaj en la pola kun resumo, bedaŭrinde tro mallongaj, en Esperanto. Juĝante laŭ la resumo, ŝajnas ke la plej interesaj estas la kontribuadoj de T. Ejsmont pri "Internacia Informado kaj Komunikado kiel Homa Bezono kaj Rajto"; de A.M. Suskin pri "Neceso Urĝe Solvi Problemon de Universala Lingvo Internacia"; de I. Lapenna pri "Juraj Aspektoj de Informperdo pro Traduko"; kaj de P. Janton pri "La Psikologia Rezistemo al Planlingvoj, Speciale al Esperanto". Estus bone, se oni povus eldoni la verkon en Esperanto. Nur post tio estus eble adekvate recenzi ĝin.

R. Kraško, Zamenhof; J. Leyk, Movado; W. Zelazny, Doktrino. Eseoj. Eldonita de Esplorokleriga Centro de Pola Esperanto-Asocio, Vârsovio, 1983. 124 p. Prezo neindikita.

Leginte la verkon, mi plene konsentas kun jena ero el la Antaŭparolo de W. Alter Lafera (W. Zelazny): "La antipode diversaj aŭtoroj rilatas al la fenomeno Esperanto same kiel ekz. la esperantistaro kiel tuto al la pentroarto".

Fakte, ni ricevis nur unu ekzempleron de la libro kaj per tio ni plenumis nian devon mencii ĝin. Tamen mi opinias, ke estas mia plua devo fari almenaŭ unu plian rimarkon. J. Leyk skribas en la antaŭparolo al sia eseo, ke P.G. Forster en *The Esperanto Movement* (La Esperanto-Movado) "en profunda, bonega sociologia analizo, apogata per enketado, skizas sociologie la diakronan evoluon kaj sinkronan nuntempon de la komunumo" /esperantlingva/. Li skribis sian eseon antaŭ ol aperis la libro de Forster (p.44) kaj li ne povis legi la vere profundan kritikan analizon de tiu libro, aperintan en la rubriko ED de *Horizonto* n-roj 4/84 kaj 5/84. Mi konsilas al la eseverkinto trastudi la menciitan kritikan analizon kaj al ĉiuj aŭtoroj de tiaspecaj primovadaĵoj eseoj bone konatiĝi kun la verkoj de Ivo Lapenna, precipe kun *Retoriko, Elektitaj Paroladoj, Esperanto en Perspektivo* kaj la dokumentaro rilatante al Unesko, por pli bone kompreni la fenomenon Esperanto. Miajn vortojn ili ne komprenu kiel riproĉon, sed kiel amikan konsilon.

P. Z.

AMNESTIO INTERNACIA: ĈAMPIONO DE HUMANECO

Feiko Munniksma



Resumo de la prelego en Leeuwenhorst julio 1984

Estas Bruno Bettelheim, iama aŭstra psikologo, kiu, post kaptiteco en koncentrejoj, eldiris jenajn vortojn: "Ni ne povas kontraŭbatali elteni katastrofajn eventojn, se ni seniĝis je la sento ke iu ŝatas kaj prizorgas nin. La plej ekstrema agonio estas senti ke oni estas tut-tute forlasita".

Sendube ĉi tiu penso okupis ankaŭ Peter Benenson, britan advokaton. Li verkis artikolon por la angla gazeto *The Observer*, titolitan "La forgesataj prizonuloj", kaj el tiu iniciato en 1961 estiĝis Amnestio Internacia (AI). Ĝi estas tutmonda libervola movado, sendependa de kiu ajn registaro, politika partio aŭ religia kredo. La organizaĵo laboras por liberigo de homoj kiujn oni enprizonigis pro ties konvinko, haŭtkoloro, lingvo, etna origino aŭ religio, kondiĉe ke ili nek uzis nek rekomendis perforton. Tiajn kaptitojn oni nomas "prokonsciencaj kaptitoj".

AI nun havas pli ol 40 naciajn sekciojn kaj laŭ la statistikoj de 1983 ĝia tutmonda membraro estas pli ol duona miliono, inkluzive de la subtenantoj, en pli ol 150 landoj. La membroj apartenas al ĉiuj tavoloj de la socio. La internacia sekretariato de AI estas en Londono. En 1977 la organizaĵo ricevis la Nobel-pacpremion.

AI estas en konsultaj rilatoj kun la organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj kaj speciale akcentas kelkajn artikolojn de la Universala Deklaracio pri homaj rajtoj, ekz. art. 19: "Ĉiu homo rajtas pri libereco de opinio kaj esprimiĝo. Ĉi tiu rajto inkludas la neĝenatan liberecon havi opinion kaj serĉi, ricevi kaj doni informojn kaj ideojn per ĉiaj rimedoj kaj senrigarde al landlimoj".

AI senrezerve kaj en ĉiuj okazoj rezistas al mortpuno kaj torturo, do senkonsidere la karakteron de la akuzo. Ĝi malakceptas la mortpunon, tial ke oni ofte uzas tiun punon kiel metodon de subpremo kontraŭ oponentoj kaj grupoj kiuj estas neglektataj en la socio pro sia raso, etna deveno, aŭ pro aliaj motivoj. Krome la mortpuno estas nekorektebla, do definitiva. La krimnombro en landoj sen mortpuno ne estas pli alta ol en landoj kie tiu puno ankoraŭ ekzistas. Sed la plej forta obŝeto de AI kontraŭ la mortpuno havas moralan kaj etikan karakteron. Ĝi estas la plej kruela, malhumana kaj sendigniga puno kaj tial konfliktas kun artikolo 5 de la Universala Deklaracio.

Amnestio Internacia energie kontraŭbatalas ankaŭ torturadon, kiu nun okazas en pli ol 60 landoj en preskaŭ ĉiuj partoj de la mondo, malgraŭ la negacioj fare

LA POŝTMARKKOLEKTADO



En 1984 ni enspezis 1500,- dkr. Ni dankas al ĉiuj *dekkvin* kontribuintoj. Plejmulte kontribuis S-ro André Veldrine, Francio, S-ro Gösta Persson, Svedio, F-ino Sirkku Koivu, Finnlando, S-ro Bertram Potts, Nov Zelando, kaj S-ro Georg Loczi, Aŭstrio. La monon ni uzas por sendi *Horizonton* al 15 esperantistoj en nepagipovaj landoj.

Teorie, laŭ la nombro 15, ni povus enspezi la dekoblan monsumon. Ankaŭ dum la 11-a Internacia Konferenco de N.E.M. en Metz ni kun danko akceptos kolektitajn poŝtmarkojn.

Eldonejo Perspektivo
Nørregårdsvej 91
DK-2610 Rødovre, Danio

de registaroj. La mondo, ankaŭ la okcidenta, preskaŭ ĉiam konis torturojn. Oni povas konstati ŝanĝigon en la torturteknikoj. En pli fruaj tempoj oni kutime uzis perforton por kaŭzi doloron, kio ankoraŭ okazas, sed krome oni nun multfoje aplikas ankaŭ psikajn turmentojn. Plurlande torturado estas eĉ parto de konscia kaj sistema registara praktiko.

Oni povas torturi multmaniere: elektraj skuoj tra la cerbo, batado per bastonoj, brulvundado per cigaredoj, puŝado de pingloj sub la ungojn ktp. kaj ĉiuj ĉi krimoj eĉ ne apartenas al la plej diablaj elpensadoj. Fifama estas la misuzo de psikiatrio por politikaj celoj, ekz. en Sovetio.

Torturo ne konas geografiajn limojn kaj oni ankaŭ ne povas atribui ĝin al unu politika ideologio aŭ al unu ekonomia sistemo. En la lastaj 15 jaroj AI pruvis milojn da torturkazoj kaj ĉi tiu ekstrema homa korupto ankoraŭ klare tendencas al plioftiĝo. En marto 1984 AI publikigis detalan raporton pri torturado kaj en aprilo ĝi lanĉis novan tutmondan kampanjon kontraŭ ĝi. Unu el la ĉefaj celoj estas la efektivigo de dekdu-punkta programo.

La esplorfako de la internacia sekretariato de AI okupiĝas i.a. pri kolektado kaj analizado de informoj pri malobservado de homaj rajtoj en la tuta mondo. AI ofte sendas juristojn, elstarajn pri homaj rajtoj, al diversaj landoj kaj konferencoj por reprezenti la organizaĵon kaj por intertrakti en ties nomo. Atenton meritas ankaŭ la helpo al familioj kies pan-gajnantojn oni malprave enprizonigis, la demarŝoj ĉe registaroj por sekurigi azilon por politikaj rifuĝantoj, la edukaj kaj klerigaj programoj pri homaj rajtoj, kaj la agado kontraŭ la "eksterleĝaj murdoj" (pli ĝuste: politikaj murdoj) kaj la t.n. "malaperoj", kies abomenaĵoj intertempe riveligis en nuntempa postdiktatura Argentino. Pri ĉi tio AI publikigis multon en studoj, raportoj, broŝuroj kaj libroj.

Pro sia scienca kaj konscienca aktivado por homaj rajtoj Amnestio Internacia nun estas alte respektata en ĉiuj partoj de nia planedo. La eduka kaj morala forto de la organizaĵo estas tre granda, ĉar ĝi senĉese akcentas kunrespondecon kaj solidarecon tutmonde kun la sennombraj viktimoj, kiuj konsumiĝas pro angoro en ekstreme mizeraj cirkonstancoj. Fakte ĝi diras ke ni mem ne povas esti vere liberaj se aliaj ĝemas sub teroro. En AI estas loko kaj laboro por ĉiu homo de bona volo kaj tute laŭ ĉies kapabloj kaj talentoj.

Leteroj

30.09.84

"Elleginte kaj admirante la lastan *Horizonton* mi rememoris la vortojn de juna, tiama gimnaziano Jens St. Larsen en Humlebæk 1977: 'Ĉi tiuj homoj estas kremo de kremo!' ... La zorgemo kaj precizeco de *Horizonto* reliefigis, kiam mi legis citaĵojn el la verko *THE ESPERANTO MOVEMENT*, kiun Prof. Lapenna recenzis kaj kritikis en ED. Kia malprecizeco en la vortelektaj, kia senzorga alproprigo de kliŝoj, onidiroj, manko de bezono *serĉi* veron el la ekzistanta materialo! Kaj la citaĵoj estis el reviziita kaj ĝisdatigita versio de - disertacio! Mi kredas (ja ne scias!), ke la kaŭzo, kial la plejparto de la esperantistaro restas ekster N.E.M., estas nezorgemo, spirita maldiligenteco, kaj tial nescio de la ekzistantaj cirkonstancoj. Estas ja pli facile iri kun amaso ol profundigi al dokumentoj. ... Kaj homo, kiu timas, ne ĉiam volas koni la veron. ...

S. Koivu "
Finnlando

23.11.84

"Mian sinceran dankon al ĉiuj, kiuj luktadas kontraŭ la negativaj fortoj, kiuj minacas kaj misuzas nian lingvon....Ĉian bonon kaj sukcesan laboron en la venonta(j) jaro(j). "

Henri W. Appel
Alberton, Sud-Afriko

18.12.84

"Kara kaj tre estimata S-ro Zacho,

Dankon pro viaj letero kaj jubilea numero de "Horizonto", kiujn mi ĵus ricevis ambaŭ hodiaŭ....

Ĉiufoje, kiam mi pensas pri la granduloj de Esperanto nuntempaj, tuj ekbrilas en mian menson, unuavice la nomo Ivo Lapenna! Ni, en Irano ege respektas lin, kaj mi persone ege kaj ade bedaŭras la malkonvenan koincidon de mia ekpaŝo en la movadon kaj retiriĝo de Prof. Lapenna el la movado. Se vi povus transdoni la plej sincerajn dankojn kaj bondezirojn de iranaj movadanoj al karega Lapenna, aŭ alskribi lian adreson al ni, bonvole ne hezitu fari tion!

Eble, estus ne mal-interese por Prof. Lapenna scii, ke en nia progresita kurso oni ĵus finis lian altvaloran libron (Elektitaj Paroladoj kaj Prelegoj). Kelkaj eĉ parkere ellernis du-tri paroladojn! Ili havis ankaŭ la ŝancon aŭdi lian plaĉan voĉon.

... Plenestime, kun bondeziroj ankaŭ por la nova jaro, mi restas via S-ro X,
Irano"

Donacoj al Horizonto

S-ino J. Kopp, Francio	115,00 dkr.
D-rino Käthe Rukavina-Danon, Germanio, por 2 el orientaj landoj .	200,00 dkr.

Fondaĵo Ivo Lapenna

Anonimaj donacoj	10.000,00 dkr.
Ing. Ivo Godek, Jugoslavio	60,00 dkr.

Nekrologo

Ila Pancer

Atingis nin trista informo, ke S-ino Ila Pancer nask. Lemberger, la edzino kaj vivkunulino de nia multjara abonanto, membro de ICNEM kaj kunlaboranto Prof. D-ro Inĝ. Oton Pancer, forpasis en Zagreb komence de novembro post longa malsano.

Al nia tre kara Oton Pancer kaj al lia multnombra familio ni esprimas nian plej profundan kondolencon kun la espero, ke la tempo, kiu cikatrigas multajn vundojn, mildigos ankaŭ lian doloron. En niaj amikaj rondoj li ĉiam trovos malfermitajn korojn kaj almenaŭ iom da konsolo.

Plenuma Komitato de ICNEM

Redakcio kaj Administracio de *Horizonto*

Mallonge

Radio Zagreb en la elsendo de la 11-a de decembro donis informojn pri la Esperanto-gazetaro. Kvankam ĝi regule ricevas la revuon *Horizonto*, ĝi ne menciis n-ro 6/1984 de nia periodaĵo. Eĉ pli, prezentante la enhavon de la revuo "Esperanto", Radio Zagreb "hazarde" ne rimarkis paĝon 3 kun la artikolo pri Ivo Lapenna. Se Radio Zagreb tiel misinformas pri aferoj, kiujn ni povas kontroli, kiel ni do povas fidi al ĝiaj novaĵoj el Jugoslavio kaj al aliaj informoj, kiujn ni ne povas kontroli? Por komparo ni povas informi, ke Radio Vieno, Berno, Varsovio kaj versajne aliaj radiostacioj omaĝis al Prof. D-ro Ivo Lapenna okaze de la jubileo ligita al lia nomo.

Broŝuro sub la titolo "Esperanto and /kaj/ Orwell" eldonis Esperanto-Asocio de Britujo kaj sendis ĝin al ĉiuj membroj de la Brita Parlamento. La enhavo de la broŝuro, fakte dokumento verkita de Prof. C.J. Adcock kaj W.R. Aldridge en 1979, estas kontentiga, kvankam pluraj eroj povis esti ellasitaj kaj aliaj pli taŭge prezentitaj. *Horizonto* pritraktos tion en la sekvanta n-ro, sed jam ĉi tie necesas diri, ke estas granda eraro ne distingi inter la nuna karaktero de Unesko kaj tiu de 1954, kiam Unesko akceptis la Rezolucion favore al Esperanto. Katastrofa eraro, pri kiu ne respondecas la aŭtoroj, sed AEB, estas la titolo de la broŝuro kaj la misklarigoj pri ĝi en la Antaŭparolo. En sia *Mil Okcent Naŭdek Kvar* Orwell prezentas "Newspeak" /Novparol/ kiel "artefaritan", primitivan lingvon "kreitan" por kompletigi la totalecan endoktrinigon de la loĝantaro. Nia preskaŭ centjara, alte evoluinta kaj kultura Esperanto funkcias kiel lingvo de internaciaj komunikado kaj interkompreniĝo, servas al fortikigo de humaneca internaciismo kaj tial estas precize la malo de la *Newspeak* de Orwell. Vere, pli sukcesan laboron kontraŭ Esperanto oni apenaŭ povas imagi, precipe nun, kiam Britio pripensas eksigiĝon el Unesko. Neniu malamiko de Esperanto povus agi pli trafe.

Pliaj universitataj kursoj en Esperanto de la Universitato de Manchester (Britio) okazis de la 12-a ĝis la 14-a de oktobro 1984. Prelegis Mag. Reto Rossetti, S-ro G. Blakey, S-ro D.S. Lord, AM, kaj Prof. D-ro I. Lapenna. La prelegoj, la postprelegaj diskutoj kaj la nove enkondukitaj seminarioj estis sur universitata nivelo. Pro la operaciigo de D-ro J. Wells, la nuna Direktoro de tiuj jam tradiciaj kaj prestiĝaj kursoj, la oktobran sesion prezidis Prof. Lapenna. Partoprenis dudeko da personoj. Por atingi pli vastan partoprenon necesos diskonigi tiujn valorajn kursojn multe pli frue.

La 16-a Korea Kongreso de Esperanto okazis en Seŭlo la 20-an kaj 21-an de oktobro 1984 sub la slogano "Por Mondpaco por Esperanto". Partoprenis ĉ. 200 personoj, inter kiuj kvar eksterlandanoj. S-ro G. Becker, Membro-Apoganto de ICNEM, estis unu el la partoprenantoj, kiuj alparolis la Kongreson. Simpozio kadre de la Kongreso pritraktis la taskojn de Korea Esperanto-Asocio por la Jubilea Jaro.

UEA ĉiam pli angliĝas, kiel atestas ne nur la anglalingvaj inaŭguraj paroladoj dum la lastaj universalaj kongresoj, sed ankaŭ diversaj anglalingvaj raportoj de anglalingvaj konferencoj de *Center for Research and Documentation on World Language Problem*, kiu, se oni esceptas la anglalingvan tradukon de la nomo, havas nenion komunan kun la antaŭhamburga *Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo*, kiel ankaŭ aliaj publikaĵoj en la angla. Oni povas demandi sin, ĉu la tasko de UEA estas propagandi la anglan en la Esperanto-Movado, aŭ ĝia tasko devus esti la vastigo de la uzo de Esperanto en la mondo, inkluzive la angle parolantan mondon. Oni povas nur miri, ke la kongresanoj ne forlasas la salonon dum tiuj anglalingvaj kongresaj paroladoj, kaj entute ne aŭdigas plej fortajn protestojn pro tiu angliĝado de UEA.

Esperanto estis multe uzata dum la 9-a Internacia Wittgenstein Simpozio, okazinta en Kirchberg/Wechsel (Aŭstrio) de la 19-a ĝis la 26-a de aŭgusto 1984. Partoprenis ducento da filozofoj el multaj landoj. Kvankam la oficialaj lingvoj de la Simpozio estis la germana kaj angla, tamen Prof. I. Lapenna inaŭguris la ekspozicion de Esperanto-libroj en la Internacia Lingvo kaj Prof. H. Frank simultane tradukis en la germanan por tiuj, kiuj ne scias ĝin (vidu *Horizonton* n-ro 5/84). Dum la publika diskuto en la ĉeesto de centoj da partoprenantoj Prof. Lapenna prelegis pri "Internaciā Kompreniĝo kaj Internacia Lingvo" en Esperanto kun simultana traduko fare de D-ro K. Perko en la germana, dum resumo en la angla estis anticipe disdonita al angle parolantaj simpozianoj. Tio signifas disvastigadi la Internacian Lingvon en kulturaj internaciaj medioj diference de la nacilingvaj inaŭguraj paroladoj en la nunaj kongresoj de UEA kun anticipe distribuitaj Esperanto-tradukoj por la kongresanoj, kio kaŭzas precize la inversan efikon.

Granda germana ĵurnalo aperigas Esperanto-kurson: En *Augsburger Allgemeine* (Aŭgsburga Generala Gazeto) aperas inter januaro kaj aprilo 1985 kurso laŭ iniciato de Stefan Maul, redaktoro de la ĵurnalo kaj ĉefredaktoro de *Monato*. La ĵurnalo aperigas la kurson okaze de la 70-a UK en Aŭgsburgo, tamen ne nur en la loka parto de Aŭgsburgo, sed ankaŭ en ĉiuj regionaj eldonoj en la bavara parto de Ŝvabio inter la rivero Danubo kaj la Alpoj.

Redaktas Kopenhaga Horizonte-Grupo
je la adreso de la administracio.



Persone

Pierre Gaborit, 60-jara

La 4-an de decembro 1984 nia artista kunlaboranto festis sian 60-jaran datrevenon. Kvankam iom malfrue *Horizonto* varme deziras gratuli al Pierre Gaborit kaj danki pro lia sindona kaj profesia laboro. Ĉiam li estas preta helpi nin kaj doni al ni siajn konsilojn. Anstataŭ publikigi lian foton, kiun la legantoj de *Horizonto* jam konas, ni montras unu el liaj japaneskaj tuŝpentraĵoj - sumi-e - arto, lingvo, en kiu ĉiu unuopa figuro simbolas la homon kaj homajn rilatojn.

**POR LA JUBILEA JARO
1987**

AFIŜOJ

PRESAĴOJ

GLUMARKOJ



POR PACO EN LIBERECO - POR LIBERECO EN PACO

MONDA KOMUNIKADO

INTERPOPOLA AMIKECO

HUMANECA INTERNACIISMO

LA INTERNACIA LINGVO - ESPERANTO 1887 - 1987

© 1984 INTERNACIA CENTRO DE LA NEŬTRALA ESPERANTO MOVADO

La poŝtkarto, 11 cm x 15 cm

La afiŝo, 48 cm x 68 cm

"La Espero"

Datapero: Mezo de junio 1984.

Prezoj (inkluzive la sendkoston):

4 afiŝoj 60 danaj kronoj aŭ egalvaloro

10 poŝtkartoj 25 danaj kronoj aŭ egalvaloro

1 folio de luksaj glumarkoj: 6 dkr. aŭ egalvaloro

Ĉe mendo de 5 serioj de kiu ajn el la publikaĵoj 1 plia serio.

ĈU VI JAM PAGIS VIAN KOTIZON AL ICNEM

KAJ ABONON AL HORIZONTO?

Se jes, ni kore dankas. Se ne, ni tre petas vin fari tion kiel eble plej baldaŭ. Vi povas pagi aŭ rekte al administracio, la kasisto en Kopenhago, aŭ al kiu ajn peranto laŭ la adresoj indikitaj sur la internaj kovrilpaĝoj de *Horizonto*.

VIA TUJA REAGO JE TIU ĈI ALVOKO MULTĖ HELPAS NIAN ADMINISTRADON KAJ KURAĜIGAS NIAN LABORON.

LA REDAKCIO RESPONDECAS PRI LA ĜENERALA LINIO DE HORIZONTO. SUBSKRIBITAJ ARTIKOLOJ NE NECESE REFLEKTAS LA STARPUNKTON DE LA REDAKCIO AŬ DE I.C.N.E.M.



INTERNACIA CENTRO de la NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO

Koresponda adreso: Kiu ajn el la funkciuloj de la Centro (v. sube).

FONDO KAJ CELOJ

Dum la *6-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado*, okazinta en Strasburgo en 1980, estis fondita *la Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado (ICNEM)*.

Unu el la celoj de *la Centro* estas manifesti kaj interne de la Esperanto-Movado kaj ekster ĝi la tradiciajn kulturajn kaj ĝenerale ideajn valorojn de la partipolitike kaj religie neŭtrala Esperanto-Movado.

La Centro kunordigas la laboron de ĉiuj neŭtralaj Esperanto-organizadoj, kiuj deziras tion. Ĝi kreas financon bazon por certigi aperadon de *Horizonto* kaj de aliaj publikaĵoj, kies linio konformas al la celoj de *la Centro* kaj al la *Deklaro de Principoj de la Neŭtrala Esperanto-Movado*.

La Centro tute ne celas fariĝi amasa Esperanto-organizaĵo aŭ konkurenci al kiu ajn Esperanto-societo. Tial ĝi havos nur limigitan nombron da ordinaraj membroj.

MEMBRECO

Kiel ordinara membro povas esti akceptita ĉiu persono, kiu parolas la Internacian Lingvon kaj ĉiu Esperanto-organizaĵo, kiu agas konforme al art. 2 de *la Statuto*. Krome fizikaj kaj juraj personoj povas esti akceptitaj kiel neordinaraj membroj. Informoj pri membrokategorioj kaj iliaj kontribuoj kaj kotizoj troviĝas en la sube menciitaj broŝuro kaj aliĝilo.

PLENUMA KOMITATO

Prezidanto Prof. D-ro IVO LAPENNA, 77 Grasmere Avenue, Wembley,
HA 9 8TF, Middlesex, Britio.

Vicprezidantoj D-ro KLAUS PERKO, Lendkai 111, A-8020 Graz, Aŭstrio.
S-ro JEAN THIERRY, 5 rue Léon Cogniet, F-75017 Paris, Francio.

Sekretario F-ino MARIANNE VERMAAS, Nieuwe Binnenweg 70, I.R. 3015 BC
Rotterdam, Nederlando.

Kasisto S-ino RIE ZACHO, Nørregårdsvej 91, DK-2610 Rødovre, Danio.

LA CENTRO KAJ HORIZONTO

Ĉiuj membroj de *la Centro* ricevadas senpage la revuon *Horizonto*, sed tiu periodaĵo, eldonata de la *Eldonejo Perspektivo*, estas ankaŭ *aparte abonebla* rekte ĉe la eldonejo aŭ pere de la perantoj, kies nomoj kaj adresoj aperas sur la dua kovrilpaĝo.

ALIĜILOJ KAJ PAGOJ

Apartan broŝuron kun la Statuto de la Centro, Deklaro de Principoj, Rezolucio de la Konferenco de Ateno, ĉiujn aliajn informojn kaj aliĝilon bonvolu havigi ĉe la sekretario. Ĝi aŭ la kasisto akceptas la aliĝojn kaj kotizojn (poŝtĉeka konto de la Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado: Kopenhago 1 19 06 01). Bonvolu atenti: Se por iu deziranta aliĝi estas pli facile pagi al la prezidanto aŭ al unu el la vicprezidantoj, li/ŝi povas pagi la kotizon ankaŭ tiamaniere, kaj la koncerna funkciulo de la Centro ordigos tion kun la kasisto.

VERKOJ DE IVO LAPENNA

Verkitaj en la Internacia Lingvo.

*Ĉiuj inspiritaj de humaneca
internaciismo.*



El la verkaro de Ivo Lapenna en la kroata, la franca, la angla kaj la Internacia Lingvo kaj japana traduko de Retoriko.

Ĉiuj verkitaj en **modela Esperanto.**

RETORIKO, la plej legata libro de la postmilita periodo, jam pli ol 5.500 ekzempleroj disvenditaj, 3-a eldono, 294 p., bindita, prezo 10 anglaj pundoj, 140 danaj kronoj aŭ egalvaloro, 2-a eldono, bindita, nur 7 anglaj pundoj aŭ 98 dkr. (nur kelkaj ekzempleroj).

ELEKTTAJ PAROLADOJ KAJ PRELEGOJ, komplemento de "Retoriko", 152 p., fortike broŝurita, prezo 7 anglaj pundoj, 98 danaj kronoj aŭ egalvaloro.

AKTUALAJ PROBLEMOJ DE LA NUNTEMPA INTERNACIA VIVO, popularsciencia kaj interesa por ĉiu klera persono, broŝurita, prezo 5 anglaj pundoj, 70 dkr. aŭ egalvaloro.

ESPERANTO EN PERSPEKTIVO (ĉefaŭtoro kaj ĉefredaktoro), monumenta, reklamata de UEA kiel "enciklopedio de la nuna tempo", tamen ne komplementa sen "Hamburgo en Retrospektivo", bindita, ilustrita, 876 p., ampleksaj persona kaj tema indeksoj, prezo 84 ned. gld., 215 danaj kronoj aŭ egalvaloro.

HAMBURGO EN RETROSPEKTIVO, konsiderinde kompletigita eldono, broŝurita, 152 p., prezo 5 anglaj pundoj, 70 danaj kronoj, 19 germanaj markoj, 50 fr.fr., 1000 pesetoj aŭ egalvaloro.

Prezoj ekde la 1-a de januaro 1984. Ĉiuj supraj libroj estas en la sama formato de 20,5 x 14 cm.

Mendeblaj ĉe nia "Libroservo de NEM", Nørregårdsvej 91, DK-2610 Rødovre, Danio. Kun escepto de "Esperanto en Perspektivo", la librojn oni povas mendi ankaŭ ĉe la aŭtoro: 77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex HA9 8TF, Britio, laŭ la prezoj indikitaj en anglaj pundoj.

Krome, unuopaj ekzempleroj de "Hamburgo en Retrospektivo" estas mendeblaj ĉe s-ro Jean Thierry, 5 rue Léon Cogniet, F-75017 Paris, Francio, aŭ ĉe bonaj libroservoj. Pli grandaj kvantoj mendeblaj nur ĉe "ELDONEJO PERSPEKTIVO", Nørregårdsvej 91, DK-2610 Rødovre, Danio, kun jenaj rabatoj: 33% ĉe mendo de minimume 5 ekzempleroj plus 10% por afranko, 33% sen afranko ĉe mendo de minimume 10 ekzempleroj.

En ĉiuj aliaj kazoj bonvolu ĉiam aldoni 10% por la afranko.

LA SUPRAJ VERKOJ DE IVO LAPENNA estas pli aktualaj nuntempe ol iam antaŭe. Ili donas klaran, science bazitan eksplikon pri la esenco de la Internacia Lingvo (Esperanto), pri ĝia rolo en la hodiaŭaj kaj estontaj internaciaj rilatoj kaj pri ĝia monde solidara funkcio. Samtempe, kune kun la artikoloj en **HORIZONTO**, ili estas la plej trafa respondo al la pseŭdosciencaj skribaĵoj de la sovetismaj ideologoj en la posthamburga UEA kaj ĝenerale en la Esperanto-Movado.

MENDU TUJ KAJ ATENTIGU VIAJN GEAMIKOJN

Helpu pluporti la torĉon de la zamenhofa esperantismo ...

LIBROSERVO DE LA NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO
Nørregårdsvej 91, DK-2610 Rødovre, Danio